

2/2021

Marto  
Aprilo

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ „Blanka morto” de Stanisław Lem
- ★ Germana-Pola E-kongreso en virtuala formo
- ★ Izrael Lejzerowicz - radikala esperantisto

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodzo@wp.pl](mailto:rk-lodzo@wp.pl)

## **Adreso de redakcio**

Robert Kamiński, ul. Kwiatowa 1/3  
94-227 Łódź

## **Kunlaboro**

Teresa Nemere, Andrzej Sochacki,  
Magdalena Tatara, Adam Wilkus,

## **ABONOJ**

La abono por 2021 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 53 zlotoj  
eksterlando - 20 eŭroj  
Cifereca (pdf)  
Pollando - 25 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post  
aldono de bankaj kostoj.  
Polan Esperantiston eblas aboni per  
Konto de PEA en UEA: peaa-v;  
Detaloj trovigas ĉe:  
<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>  
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Fronta kovrilpaĝo - Grażyna Szubryczyńska el Toruń.

## **Estraro de PEA**

Robert Kamiński - prezidanto  
Agnieszka Mozer - vicprezidanto  
Zofia Śmistek - sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la autoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendadas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Represo kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto

Bankokonto por donacoj  
64 2130 0004 2001 0558 6110 0001  
liberan monsumon priskribu  
per vorto "Darowizna"



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

## Enhavo

Redaktoraj vortoj .....	2
<b>Estraro informas</b>	
<i>Guido Brandenburg, Robert Kamiński</i> , Germana-Pola Esperanto-Kongreso okazos en virtuala formo .....	3
<b>Eventoj</b>	
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , Ni kore invitas vin partopreni en... ..	4
<i>Robert Kamiński</i> , Grandaj dankoj al Ela Karczewska! .....	5
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , La pandemia tempo kaj Svetlana Pogorelaja .....	6
<b>Mojose</b>	
<i>www.pej.pl</i> , Junulara Esperanto-Semajno 2021/2022 .....	8
<b>Raportoj, rakontoj</b>	
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , Mi prudente aĉetas kaj dank' al tio mi malpli da forĵetaĵoj produktas .....	8
<i>Roman Dobrzyński</i> , "Fluo de vivo" .....	10
<i>Paweł Dzienis</i> , Surmarsigiĝis la nova roboto .....	12
<b>Pri kio ni aŭdas</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , Novaj energiaj etiketoj .....	14
<b>Vizitindaj lokoj</b>	
<i>Teresa Nemere</i> , Etnografia Olendra Parko .....	23
<b>Homoj</b>	
<i>Ulrich Lins</i> , Izrael Lejzerowicz - radikala esperantisto – 1-a parto .....	19
<i>Esperantistoj de la Filio de PEA el Gliwice</i> . Forpasis nia kluba kolegino .....	23
<i>Eŭropa Centro de Interkultura Edukado</i> , Aleksander Pecyna .....	24
<i>Vikipedio</i> , Andrzej Pettyn eksterordinara esperantisto .....	24
<i>Krystyna Zgud</i> , Bona homo Marek .....	26
<b>Lingvosciencia angulo</b>	
Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, Da – bazaj reguloj .....	26
<b>Literaturaĵoj</b>	
<i>Stanisław Lem</i> , Blanka morto .....	28
<b>Saĝulaj pensoj</b>	
<i>Germain Pirlot</i> , Lerni la ciferecon kaj lerni ciferece, .....	33
<b>Leterkesto</b>	
<i>James, Filatelista peto</i> .....	34
<i>Andree Grossmann</i> , Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj .....	34
<i>Jerzy Dryja</i> , La eldonaĵo de "Pollando" informas pri Zamenhof .....	35
<b>Kalendaro</b>	34
<b>Diverse, facile, bonguste</b>	
<i>Andreo Bach</i> , Kukurba supo kun pastaĵetoj .....	37
<b>Oni eldonis</b>	
"Maskarada wokół śmierci. Nazistowski świat na Węgrzech", „Dwie strony drogi Du flankoj de la vojo" .....	38
<b>Forpasis</b>	
<i>Aleksander Pecyna, Bogusława Bronowska, Marek Pierkiel, Andrzej Pettyn</i> .....	39

<b>El la fotogalerio de Andrzej Sochacki</b>	
<i>Andrzej Sochacki</i> , 7-aj E-tagoj de Staszów .....	40
<b>Amuze</b>	
<i>Adam Wilkus</i> , Resumoj de kruĉenigmoj .....	43
<b>Zamenhof/Esperanto-Objektoj</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando – 2 .....	44

## Redaktoraj vortoj

### Estimataj legantoj

En viaj manoj jam la dua ĉijara numero de Pola Esperantisto. Ĝi aperas iom malfrue, sed kolektado de tekstoj kaj redaktoraj laboroj daŭris ĉifoje escepte longe. Diversaj aferoj, simplaj dum la antaŭpandemia tempo, nun bezonas pli da tempo kaj pacienco.

Kun la granda ĉagreno ni eksciis pri la forpaso de Andrzej Pettyn, eminenta persono, unu el la plej konataj esperantistoj en lasttempa Esperanto-movado en Pollando. Mallonga teksto apliprosimigas al ni lian personon. Bedaŭrinde, en la nuna numero ekaperas ankaŭ aliaj nekrologoj de aliaj esperantistoj.

En la lastaj semajnoj evidentiĝas, ke la ekzistantaj limigoj, pro la kronvira pandemio en Germanio kaj en Pollando ne malaperos. Estraroj de PEA GEA kaj IFEF decidis rezigni pri la ĉesta formo de la komuna kongreso, kiu estas planata en Franfurto ĉe Odro kaj Ślubice kaj estis prokrastita de la jaro 2020. La kongreso okazos en la virtuala formo. Ni invaitas vin partopreni en tiu ĉi evento. Bonvolu plu legi pri la kongreso en la ĉapitro “Ĉefa Estraro informas”.

Redakcio decidis prezenti en la nuna numero interesan artikolon de Ulrich Lins pri Izrael Lejzerowicz. Tiu fama Esperanto-pioniro, devenanta el Lodzo, ne havas multajn biografiajn prilaborojn kaj la artikolo permesos pli detale ekkoni lian vivon. Pro ĝia longeco, la artikolo estas legebla poparte, en tri sekvaj numeroj de PE. La artikolo aperis ankŭ ĉe: <https://mondmilito.hypotheses.org/>.

Daŭrigata estos ankaŭ la temo, priskribita de Teresa Nemere en la artikolo pri la menonita etnografia parko apud Toruń. Inter la nun vivantaj posteuloj de menonitoj, kiuj vivis en Pollando, troviĝas akaŭ esperantistoj. Interesa estas rakonto pri la aŭtoro de la esperantlingve verkita historio de tiu interesa populgrupo.

En la ĉapitro literatuaĵoj, ni prezentas al niaj legantoj esperantigitan verkon de Stanisław Lem - unu el la patronoj de la jaro 2021, elektitaj de Pola Sejmo.

Por iom “fuĝi” de niaj teraj problemoj, ni invtas vin per la artikolo de Paweł Dzienis al la planedo Marso. Ne forgesu ankaŭ pri niaj konstantaj aŭtoroj – Roman Dobrzyński, Kałgorzata Komarnicka kaj Andrzej Bach.

*Robert Kamiński*

*Guido Brandenburg, Robert Kamiński*  
Kongresa Organiza Teamo

## Germana-Pola Esperanto Kongreso okazos en virtuala formo

### Ĉeesta kongreso ne eblos

Komence de aprilo evidentiĝas, ke la ekzistantaj limigoj, pro la kronvira pandemio en Germanio kaj en Pollando (kaj aliloke en Eŭropo), almenaŭ dum la venontaj semajnoj, ne malaperos, sed eble fariĝos pli striktaj. En tia situacio, kun granda bedaŭro, GEA, PEA kaj IFEF decidis rezigni pri la planita ĉeesta kongreso en la limurboj Frankfurt (Oder) kaj Słubice. Prokrasti ĝin jam duan fojon, pro pluraj kaŭzoj, ne eblas. Sekvante la ekzemplon de aliaj Esperanto-eventoj, ni anstataŭos planitan, ĉeestan kongreson per virtuala.

La organizantoj jam kontaktis plurajn el la kontribuantoj kaj esperas oferti samkvalitan programon - eĉ se mankos la loka etoso, neformalaj renkontiĝoj, la ekskursoj kaj la jarĉefkunvenoj. Ankaŭ la virtuala kongreso komenciĝos vendredon (21.05.) vespere kaj daŭros ĝis lundo (24.05.) tagmeze. La temo "najbaroj" restos valida. La fervojistoj ne bezonos rezigni pri la fakprelegoj, kiujn cetere ĉiuj kongresanoj povos sekvi. Teknike ni uzos la Zoom-konton de GEA. Ĝi ebligas ankaŭ paralelajn programerojn. Pri la estiĝanta programo ni informos vin dum la venontaj semajnoj. Aliĝintoj (sed nur ili!) ricevos la alirkodon kaj ĉiujn necesajn detalojn ĝustatempe, antaŭ la kongreso.

### Senpaga, sed ne senkosta

Ĉar ĉeesta kongreso ne okazos, la organizantaj asocioj, kiel promesite, reĝiros jam ricevitajn antaŭpagojn. Vi rericevos la monon de tiu asocio, al kiu vi pagis. La reta partopreno estos senpaga. Ĉiujn ĝisnunajn aliĝintojn ni konsideras kiel aliĝintojn al la virtuala kongreso. Evidente, ankaŭ nun eblas pliaj aliĝoj. Ni daŭrigos informadon pri la kongreso dum la venontaj

Transponta Esperanto-Kongreso  
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Słubice  
21-a – 24-a de Majo 2021

★  
TRAKO

semajnoj - kaj eble, je la fino, ni havos pli da partoprenantoj ol ni atendis. Kiel por la ĉeesta kongreso, ni pretigos kongresan broŝuron (realan kaj virtualan) kun resumoj de la kontribuoj.

La Fonduso por German-Pola Kunlaboro konfirmis, ke ĝi subvencios ankaŭ virtualan eventon kaj pretas transpreni maksimume 80% de la kostoj. Tio estas bona novaĵo kaj ebligos eĉ pagi honorariojn, sed signifas, ke la restantaj 20% (ĉirkaŭ 1000 eŭroj) devos esti financataj alimaniere.

**Donacoj** al la kongresa kaso do estas eĉ pli bonvenaj ol kutime – fakte tio estas la sola ebleco eviti deficiton por la tri asocioj. Bonvolu indiki al ni, se vi **pretas parte rezigni pri repago de la kotizo**, aŭ ĝiru donacon al la konata konto. Ni promesas, ke ĉiuj donacoj eniros la kongresan kason.

Konto de Pola Esperanto-Asocio por kongreso - pagoj en eŭro: PL 70 1140 2004 0000 3712 0121 6787, BIC/SWIFT mBank: BREXPLPWXXX,

Konto de Pola Esperanto-Asocio por kongreso - pagoj en zlotoj: PL 90 2130 0004 2001 0558 6110 0018 IBAN/BIC: volkswagen bank INGBPLPW

Konto de Germana Esperanto-Asocio por la kongreso: IBAN DE09 5085 1952 0040 1145 97 ĉe Sparkasse Odenwaldkreis (BIC : HELADEF1ERB).

**Aliĝilon bonvolu sendi al:** pea@esperanto.pl, Polski Związek Esperantystów, ul. gen. W. Andersa 37/59A, 00-159 Warszawa elektronikan aliĝilon vi trovos en retejo de PEA [www.esperanto.pl](http://www.esperanto.pl)

## Eventoj

*Małgorzata Komarnicka*

### Ni kore invitas vin partopreni en la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021

Organizanto de la konkurso estas: Eŭropa Centro de Interkultura Edukado en Vroclavo. Regularo de la konkurso troviĝas sur la konkursa retejo: <https://www.esperanto-festivalo-vroclavo.eu>

La ĉijara festivalo estas dediĉita al infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj.



**Eŭropa Festivalo  
de Esperantaj Kantoj**

Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

**VROCLAVO**

urbo de renkontiĝoj

Honora Patronado de la Prezidanto de Vroclavo

Ĉiu partoprenonto bonvolu sendi, ĝis la 15-a de aŭgusto 2021, sian videofilmon kun registrita, esperantlingva kanto, la partituron kaj la tekston de la kanto. Bonvolu sendi ankaŭ plenigitan aliĝilon.

Sendado estas ebla per la retejo: <https://www.esperanto-festivalo-vroclavo.eu>, aŭ rekte al la adreso: [festivalo.eo@gmail.com](mailto:festivalo.eo@gmail.com). Post la 15-a de aŭgusto, la konkursa komisiono organizos aŭskultadon de la senditaj kantoj. La premioj estos aljuĝitaj por la unuaj tri lokoj. Plie estos aljuĝita Ĉefpremio. Ni aldonas ankaŭ la novan premion – Aŭtoran-Premion. Ĝin ricevos konkursanto, kiu prezentos plej bone la propran kanton.

Ĉi-jare, la publiko aljuĝos sian premion. Voĉdonado por la publikpremio okazos per interreto, ekde la 15-a de aŭgusto.

La Festivalo okazos en tri kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto. 3. kanto registrita en studio. La 12-an de septembro okazos la interreta koncerto de la premiitoj.

La honoran patronecon de la festivalo jam akceptis Bohdan Aniszczyk - la Prezidanto de la Eduka kaj Junulara Komisiono ĉe la Vroclava Urba Konsilio kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), EUROKKA (muzika faka asocio de UEA, la kreinto de la eldonejo Vinilkosmo), "Juna Amiko" (unu el plej konataj kaj ŝatataj revuoj en Esperantujo) kaj la retradio "Varsovia Vento Elsendoj".

Al la partoprenantoj atendas multaj belegaj premioj!

Inter la premioj EUROKKA fondis jarabonojn al ABONKLUBO (aliro al la kompleta katalogo de Vinilkosmo, al katalogoj de 75000 aliaj sendependaj muzikeldonejoj kun 400 000 da artistoj kaj 7 milionoj da titoloj).

Por ricevi ĉiujn informojn, skribu al: [festivalo.eo@gmail.com](mailto:festivalo.eo@gmail.com) (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto), telefonu: +48 692 551 131, +48 606 858 640, aŭ vizitu la retejon:

**Europejskie**  
Centrum  
Edukacji  
Międzykulturowej

[www.ecem.com.pl](http://www.ecem.com.pl) /, <https://www.facebook.com/efekantoj/>





*Robert Kamiński*

## Grandaj dankoj al Ela Karczewska!

La 29-an de januaro 2021, post 11 jaroj, Ela Karczewska, kiu kreis kaj sukcese administris Esperanto-libraron en la Zamenhof-Centro en Bjalistoko, pro emeritiĝo, finis sian laboron.

Ŝi organizis multajn literaturajn projektojn, en kiuj partoprenis ne nur membroj de la Societo. Inter la plej interesaj estis ekz: la ĉiujara Nacia Legado en Esperanto, literatura konkurso kun

la eldonitaj Bjalistokaj Kajeroj, la kampanjo "Dividu vian libron" kaj regulaj literaturaj renkontiĝoj en la E-libraro (14-a filio de Podlaha Libraro).

Koran dankon pro la tuta laboro, bonega etoso dum renkontiĝoj kaj entuziasmo, kiun ŝi ĉiam dividas kun esperantistoj kaj amikoj. Ni deziras al Ela multajn feliĉajn momentojn en Esperantujo!

---

*Małgorzata Komarnicka*

## La pandemia tempo kaj Svetlana Pogorelaja

La jaro 2021 daŭrigas la tutmondan lukton kontraŭ la kronvira pandemio Covid-19. Ni ĉiuj konsentas, ke la viruso ŝanĝis nian mondon kaj influis nian vivon senkonsiderante tion, kie ni loĝas kaj kiu ni estas. Ni pli kaj pli fariĝas deprimitaj kaj nia vivo perdas la ĝisnunan brilon.

Malgraŭ tiu kruela tempo, multaj personoj kaj organizaĵoj provas funkcii al kutimiĝante al tiu nova situacio. Precipe malfacila estas la situacio de pliaĝuloj, kiuj ofte estas solaj kaj ne povas libere forlasi sian loĝejon. Multaj el ili povis ĝis nun pasigi tempon, partoprenante en interesaj



programoj, preparitaj speciale por ili. Tiam ili forgesadis pri sia soleco kaj ofte ili sentis sin bezonataj. La pandemio ŝanĝis ankaŭ tion.

Dum tiu malfeliĉa tempo kaj deviga izolado, la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, jam de komenco de la pandemio, preparas interretajn programojn kun Esperanto-kurso. Ĝuste al tiu kurso mi deziras dediĉi iom da tempo. La kurso okazas dufoje semajne. Tiujn sukcesplenajn renkontiĝojn gvidas la esperantistino el Ukrainio - **Svetlana Pogorelaja**. Svetlana de tempo al tempo invitas nin viziti per interreto Kievon, la ĉefurbon de Ukrainio.

Svetlana, dum la lundaj renkontiĝoj, proponas multajn gravajn kaj interesajn programojn. Ekzemple ŝi prezentis al kursanoj la ukrainan pentristinon Katerina Bilokur, kaj la faman esperantiston Vasilij Eroŝenko. Dum tiuj renkontiĝoj la partoprenantoj kelkfoje rolas ankaŭ kiel prelegantoj kaj ili prezentas mem preparitajn prelegojn pri famaj personoj aŭ pri la propraj urboj.

Dum la renkontiĝoj estas farataj multaj fotoĵoj, kreataj filmetoj, ni aŭskultas muzikon, kantadon, mem kantas kaj eĉ kreas teatraĵetojn. Vintre ni povis eĉ viziti ĝardenon de diverskoloraj someraj ĉarmaj azaleoj.

Tiuj renkontiĝoj, kiujn gvidas esperantistino preskaŭ neparolanta la polan lingvon, estas por la partoprenantoj perfekta parolpraktiko, interesa laboro, kaj ankaŭ bona ekzemplo por imitado.

Eĉ en tiu tre malfacila tempo ni provas uzi nian humoron kaj kreativecon por helpi al aliaj plibone travivi la pandemion. La pliaĝuloj de Vroclavo kaj ĉirkaŭaĵo, dank' al la interretaj programoj de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, ŝanĝas siajn ĉiutagajn kutimojn. Ili lernas kaj per skajpo senĉese subtenas la interhomajn kontaktojn kaj pasigas tempon en pli bela, fabela kaj sekura mondo. Ni uzu modernajn teknikaĵojn, kunlaboru en la nova situacio kaj disvastigu Esperanton kune kun niaj esperantistaj amikoj.



### Junulara Esperanto-Semajno 2021/2022

La lasta jaro estis vere malfacila por ni ĉiuj. Post la devigita nuligo de la surloka JES, fine de 2020, ni sukcese starigis anstataŭan virtualan eventon kaj tre ĝojis pri la vasta kaj vigla partoprenado en ĝi. Kaze, ke vi maltrafis ĝin, ni regule alŝutos videojn de la okazintaj programeroj, kiel koncertoj, prelegoj kaj aliaj, sur la jutuba kanalo de PEJ: <https://www.youtube.com/watch?v=uLkCAFOIHe0...>

Post iom da riprenso, ni nun eĉ pli ĝojas povi anonci al vi, ke laŭplane, inter la 28-a de decembro 2021 kaj la 4-a de januaro 2022, okazos la 13-a Junulara Esperanto-Semajno en Wittenberg, Germanio. Kompreneble ankaŭ ni scias, ke la pandemio ankoraŭ ne finiĝis, sed ni forte esperas, ke fine de tiu ĉi jaro ni povos jam denove renkontiĝi kiel antaŭe, por plej senzorge festi ne nur la finon de la jaro, sed ankaŭ finiĝon de tre malfacila tempo.

Pli detalaj informoj sekvos baldaŭ. Kaze, ke vi havas demandojn aŭ mem povus imagi kontribui iamaniere al la organizado, ne hezitu mesaĝi per „Telegramo” al [t.me/mixalhs](https://t.me/mixalhs).

## Raportoj, rakontoj

*Małgorzata Komarnicka*

### Mi prudente aĉetas kaj dank’ al tio mi malpli da forĵetaĵoj produktas

Nia ĉiutaga agado estas forte ligita kun naturprotektado. Gravus, ke ni konscie faru aĉetojn kaj memoru, ke ĉiu nia aĉeto havas siajn konsekvencojn. Ni devas lerni aĉeti kun pli frue preparita listo, ĉar tiam ni ne aĉetos pli da produktoj ol ni bezonas. Aĉeto pli da produktoj kausas pli da forĵetaĵoj, malŝparado de nutraĵo, manko de akvo- kaj energioŝparo kaj

tio havas ruinigan influon al la klimato kaj kontribuas al emisio de forcejaj gasoj.

La forĵetado de manĝaĵo estas ankaŭ grava problemo socia kaj ekonomia. La Papo Francisko instigas nin, ke ni ĉiam memoru pri unu el la gravaj ekleziaj tradicioj: zorgado pri manĝaĵo, laŭ la principo – *manĝaĵo, kiun ni malŝparas, estas la manĝaĵo kiun ni ŝtelas de la tablo de malriĉuloj.*

Ni malŝparas 1/3 da produktataj nutraĵoj kaj konstante en la mondo mortas homoj pro malsato, ne nur en la malriĉaj landoj, sed ankaŭ en la riĉaj. La malŝparado de nutraĵo estas serioza problemo de la tuta mondo.

Ni devas nepre limigi la forĵetadon de manĝaĵo en niaj hejmaj mastrumadoj, sed ankaŭ dum la procedo de ilia produktado kaj vendado. Valoras starigi la demandon: Kiu plej multe malŝparas nutraĵojn? La respondo estas simpla: Ni, konsumantoj... Ni tre rapide konvinkigis trarigardante ciferecajn datenojn, kiujn ni senprobleme trovos, ke ne gastronomio, industrio aŭ vendejoj malŝparas plej multe, sed ni. Kompreneble, dank' al vendejoj, ni tre facile enfalas en superfluan konsumadon... Kial? Ĉar ni aĉetas tro multe, precipe dum specialaj ofertoj, ni ne scipovas ĝuste konservi la manĝaĵojn, ni preparas tro multe da manĝaĵo kaj ni ne estas kuirarte kreemaj, ni ne volas serĉi bonajn receptojn por kuiru uzante ankaŭ manĝrestaĵojn, ni ne kontrolas la datojn de la manĝtaŭgeco kaj ni ne legas etiketojn ... Cetere ni al kutimiĝis „aĉeti per okuloj” ju pli bela frukto aŭ legomo, des pli volonte ilin ni aĉetas. Ni forgesis, ke fruktoj kaj legomoj el niaj hejmaj ĝardenoj ne estas same kiel en vendejoj belegaj kaj idealaj ... Kion ni plej ofte forĵetas? Tiun demandon ni mem facile scipovas respondi, observante niajn aĉetojn. Statistike, plej ofte ni forĵetas panon, fumaĵ-viandon, fruktojn kaj legomojn.



Ni devas konscii, ke malŝparo de nutraĵoj estas interalie ankaŭ malŝparado de akvo, energio, nia propra laboro, plugeblaj kampoj ... Kompreneble, ni neniam atingos idealan situacion, ke ni nenion malŝparas. Ni estu realistoj. Tamen, ni povas tre limigi nian malŝparadon ŝanĝante

nian vivstilon. Ni fariĝu pli sociaj, malavaraj, helpemaj kaj ni forgesu pri materialismo, avideco, morala apatio. Ni ekinteresiĝu pri la temo de malŝparado de nutraĵo, ĉar, bedaŭrinde, mankas edukprogramoj je tiu kampo. Ni memoru, ke niaj ĉiutagaj aĉetdecidoj estas ege gravaj ne nur por ni, sed ankaŭ por la tuta mondo. Mi mem ne scias, kiom da difektoj kaŭzas la besta agrikulturo, ĉar pri tio ni certe ofte aŭdas aŭ legas kaj mi ankaŭ ne instigos, ke ni fariĝu vegeteranoj aŭ veganoj, sed, por savi nian belegan teron kaj samtempe nian sanon, ni komencu limigi manĝadon de viando.

Ni provu forte diri „STOP!” al nia troa konsumado.

---


Roman Dobrzyński

## “Fluo de vivo”

### Mi malpacience atendis promesitan libron el Japanio.

Antaŭ jarcentoj velŝipistoj portugalaj, poste britaj kaj nederlandaj, veturis al la japanaj insuloj tri monatojn. En la 21-a jarcento okazis granda „progreso”, ĉar nur du monatojn bezonis la libro por veni el Japanio al Pollando. La poŝto kulpigas kronviruson kaj mi, la simpla homarano, devas ĝoji, ke la atendita libro ne dronis en la oceano, sed entute venis al mia adreso.

La heroo de tiu ĉi longa ekspedicio estas la libro „Fluo de Vivo”<sup>1</sup>, verkita de la japano Jasuo Tabuĉi, kiu estas intruisto de la angla lingvo en katolika lernejo en la urbo Kobe. Li estas ankaŭ membro de la kultur-religia organizajo Oomoto kaj esperantisto. La aŭtoro jam en la antaŭparolo konfesas, ke la verkadon de tiu ĉi libro li dankas al la nuntempa pandemio; Se ĝi ne okazus, la libro, verŝajne, neniam estus skribita. Jasuo Tabuĉi ne laŭdas kronvirusojn, sed li konsciigas al siaj legontoj, ke ĉiu situacio malbona donas ŝancon labori por bono. Li priskribas kelkajn eventojn el sia vivo, kiam li demandis: „Ho, Dio, kial mi devas sperti tiun teruran aferon?!” Sed, rezulte de siaj suferoj,



---

<sup>1</sup>Jasuo Tabuĉi *Fluo de la Vivo* Tenseiŝa, Kameoka, Japanio, 2020

li ekvidis esti amata de siaj familianoj kaj amikoj kaj tiam li diris: „Kia feliĉo”.

La libro de Jasuo Tabuĉi malkovras la homaranan mondon. La aŭtoro citas nomojn de multaj esperantistoj, kiuj senŭualigis la tutgloban perspektivon de la Esperanta ideo. Li rememorigas siajn kontaktojn kun Marjorie Boulton, William Auld, Renato Corsetti kaj lian edzinon Anna Loevenstein, la japanon Jasuo Hori, la koreon Jungkee Lee kaj multajn aliajn, kun kiuj li amikiĝis dum Universalaj Kongresoj de Esperanto. Li parolas pri landoj, kiujn li ekkonis ne danke al sia profesia la angla lingvo, sed pro Esperanto. Eble plej multe da librospaco li dediĉis al Pollando. En la tuta ĉapitro pri la patrujo de la lingvo internacia li priskribas sian viziton en nia lando kun la japana amiko Mizutani Joŝinori, post la UK en Lahtio (2019). En tiu ĉi rakonto mi rimarkis tre intersan ateston pri la influo de esperantistoj al la monda kulturo kaj pro tio mi proponas resumi la rakonton: La japanaj gastoj renkontiĝis kun varsoviaj esperantistoj en la klubejo, poste ili ĉeestis piknikon kun gejunuloj de varsovia E-klubo „Varsovia Vento” de la eterne juna Irek Bobrzak. La sekvan, preskaŭ tutan tagon, ili pasigis sur la tombejo, kie kuŝas Ludoviko Zamenhof kaj naŭ liaj familianoj. Ĉe ĉiu tombo ili faris teceremonion. Dum la antaŭlasta tago mi veturigis ilin al la germana ekstremejo Treblinka, kie pereis proksimume 700 mil judoj, inter ili Lidia kaj Zofia Zamenhof. Jasuo kaj Joŝinori celebris tie la kortuŝan preĝadon en la rito de Oomoto.

Ni daŭrigis la vojaĝon al Bjalistoko, kie ĉe la Zamenhof-strato, rande de la ĉefa urboplaco, ĵus estis starigita la **dua Zamenhof-monumento**. Ni venis unue al la Zamenhof-Centro ĉe la Warszawska-strato, kie atendis nin ĝia oficistino Katarzyna Lewończuk. Ŝi sciis, ke la japanoj planas fari teceremonion ĉe



la „juna Zamenhof” kaj sciigis pri tio ĵurnalistojn. La ceremonio, aranĝata de Jasio kaj Joŝinori, allogis dum tiu ĉi dimanĉa postagmezo ne nur la lokajn amaskomunikilojn, sed ankaŭ multajn promenantojn. Jen perfekta

propagando, multe pli efika ol la rutina flormetado. La priskribita okazintaĵo pravas, ke esperantistoj, dum diversaj internaciaj renkontiĝoj, variigas kaj buntigas la lokajn kutimojn aldonante elementojn de kutimoj el siaj landoj. Sen troigo do oni povas diri, ke esperantistoj riĉigas la mondan kulturon.

---

*Paweł Dzienis*

## Surmarsiĝis la nova roboto

La planedo Marso estas nomata ruĝa planedo. Oni ofte diras, ke virinoj estas el Venuso kaj viroj estas el Marso. Tio estas interesaj temoj, sed nun ni okupiĝu pri konkero de spaco kaj realigo de homaj revoj.

### Surmarsiĝo de la nova marsa veturilo

Jaŭde, la 18-an de februaro 2021, la roboto „*Perseverance*” de la usona, kosma agentejo NASA, (Nacia Aereonaŭtika kaj Kosma Administracio) venis al Marso. La raketo Atlas 5, varianto 541, enhavanta la esplorveturilon, ekflugis de la milita aerbazo en Kabo Canaveral la 30-an de julio 2020. La vojaĝo al Marso do daŭris pli ol duonjaro. Nomo de la marsa esplorveturilo „*Perseverance*” signifas „persisteco”. Ĉi tiu grava evento havas interesan kunligon kun Esperanto. D-ro Loïc Rossi -? (D-ro Loĉjo), planedosciencisto kaj esperantisto rekte komentis la eventon de la surgrundiĝo, respondis al demandoj kaj donis multajn sciencajn rimarkojn pri la misio kaj Marso esperantlingve. Li preparolis la eventon en Esperanto sur la jutuba kanalo „Sekvu la alvenon de *Perseverance* sur Marson!” - <https://www.youtube.com/watch?v=ZrG8udYejuU>. Ĉi tiu elsendo estis ne nur raporto pri ĉi tiu epoka okazintaĵo, sed ĝi montras la utilon de Esperanto sur tiu ĉi kampo de la homaj entreprenoj.

### Kiel aspektas kaj sonas la ruĝa planedo?


„*Perserverance*” sukcese surgrundiĝis sur la marsa kratero, nomata „*Jezero*” (esp. Lago). Ĉi-tiu loko de la iama lago, kiu konservas la spurojn de pluraj riveraj deltoj, estis elektita, ĉar ĝi povus esti utila loko por sekvaj esploroj pri iama vivo. La loko prezentas grandan geologian diversecon. La esplorveturilo jam sendis al Tero fotojn de Marso, la sonon de la marsa vento kaj la sonojn de ĝiaj radoj, moviĝantaj sur la marsa sablo.

## Pola kontribuo

La esplorado de la planedo havas ankaŭ polajn spurojn. Ĉu vi scias, ke la teamo de studentoj de la Fakultato de Mekanika Inĝenierado de la Bjalistoka Teknologia Universitato ankaŭ konstruis marsan esplorveturilon. Ili partoprenis en la internacia konkurso *University Rover Challenge (URC)*, organizita de *The Mars Society* en Usono, proksime al la bazo de *Mars Desert Research Station* sur la dezerto en la usona Utaho. La esplorveturilo, nomita „*Hyperion*”, sukcesis kaj akiris la unuan konkursan lokon en 2013, kaj la dua veturilo, „*Hyperion 2*” venkis en 2014. Mi esperu ke la talentaj studentoj en estonteco sukcese kunlaboros kun usonaj sciencistoj.

## La blogo „Scivolemo” pri Marso

Pri esplorado de Marso vi povas ekkoni pli, rigardante esperantlingvan filmeton sur la scienca jutuba blogo en Esperanto – „*Scivolemo*” - „*Kiel atingi Marson*” kaj legante artikolon - „*La novaj steluloj de marseksplorado*”.



## La celoj de la usona misio „Marso 2020”

La celoj kaj taskoj de la usona misio „Marso 2020” estas: esplorado de eblecoj por vivo sur Marso (ĉefe en la pasinteco), analizo de la marsa klimato, geologio, kaj ankaŭ preparado de estontaj homaj vojaĝoj al Marso.

Kiel parto de ĉi tiu misio, en aprilo 2021, NASA planas flugigi la droneon *Ingenuity* en marsa atmosfero. Tio ne okazos pli frue ol la 8-an de aprilo. Ĝi estos la unua flugo de stirebla aviadilo kun la propra motoro en atmosfero de alia planedo ol la Tero. NASA komparas la unuan flugon en la marsa atmosfero kun la historia, unua aviadila flugo de la fratoj Wright, la 17-an de decembro 1903.

„Persistemo” kaj „Inĝenierco” - la marsaj robotaj nomoj estas vortoj, kiuj simbolas la marsan mision kaj aventuron. Sekvu la vojaĝon de la esplorveturilo sur Marso. Mi scivolas, kion novan ĝi sendos al ni el la ruĝa planedo.

## Pri kio ni aŭdas

*Robert Kamiński*

### Novaj energiaj etiketoj

La energia klaso de la aparato estas tre grava faktoro, influanta la aĉetajn decidojn. La disvolviĝo multe pli efikigis la nunajn aparatojn ol tiuj kiuj estas nuntempe en la plej alta klaso A +++. Eŭropa Unio enkondukas novajn energiajn etiketojn kaj modifas la aparatan etiketan sistemon.

Laŭ la enketoj de “Eŭrobarometro”<sup>2\*</sup>, preskaŭ 80% de aĉetantoj atentis la informojn sur la etikedo. Laŭ EU-regularoj, ĉiuj hejmaj aparatoj kaj lumfontoj devas havi energian etiketon. La etikedo enhavas informojn pri la jara konsumado de energio. Laŭ la nuna skalo, klasoj A, A +, A ++ kaj A +++ estas la plej altaj inter eblaj kaj signifas la plej energi-efikaj aparatojn.


Aparatoj de ĉi tiu klaso kutime pli multekostas ol tiuj de la klaso B aŭ C. Malgraŭ ĉio, aĉetado de ili estas ofte pli profitdona. Komparante la jaran koston de la energikonsumo por la funkciado de la aparato, oni vidas, ke aĉeti fridujon el malaltranga klaso estas nur ŝajne pli malmultekosta solvo. Tial, la energia klaso ofte estas eksponata avantaĝo de la aĉetaĵo. Konsumantoj devas aparte atenti etiketojn, ĉar Eŭropa Unio ŝanĝas la regulojn por etikedi produktojn.

---

<sup>2</sup> Eŭrobarometro - internacia projekto de la regula enketo pri publika opinio komisiita de la Eŭropa Komisiono. Publikaj opiniondoj estis faritaj de la Eŭropa Komisiono dufoje jare ekde 1973.



La novaj energiaj etiketoj ekaperos sur aparatoj ekde marto 2021. Komence sur fridujoj, lavmaŝinoj, lavmaŝinoj-sekigiloj, telerlaviloj, televidiloj kaj ekranoj.



Siavice la aliaj energi-fontoj havos novajn energiajn etiketojn ekde la 1-a de septembro 2021. La nova etikedo revenos al la antaŭa skalo. La aparatoj estos taksataj laŭ la skalo de A ĝis G. Estas tre grave, ke la nuna A +++ energia klaso en la nova skalo havos klason C. Aparataro kun la nunaj klaso A + kaj A ++ estos "nur" F kaj G. Novaj klasoj A kaj B nun estas rezervitaj por aparatoj, kiuj estos konstruitaj en estonteco. Ili devas esti eĉ pli energi-efikaj kaj ekonomiaj ol la nunaj.

La novaj energiaj etiketoj havos ankaŭ aldonajn informojn pri la aliaj ecoj de ili. Unu el ili devas esti informo pri la generata bruo aŭ la kvanto de akvo, bezonata por laboro (ekz. por unu lavciklo en lavmaŝino). Krome, ni trovas tie QR-kodon, kiu ligos al retejo kun pli detalaj informoj pri la aparata modelo. La kodo estas ligebla al la datumbazo EPREL (Eŭropa Registro pri Energia

Etikedo). Produktistoj devas registri siajn produktojn en datumbazo por modeloj kun energiaj etiketoj.

*Teresa Nemere*

### Etnografia Olendra Parko

La urbo Toruń estas vaste konata en nia lando kaj ankaŭ ofte vizitata de eksterlandanoj, precipe kiel naskiĝurbo de la fama astronomo Mikołaj Kopernik/Nikolao Koperniko/ kaj jam de la mezepoko konataj tie, bongustaj spickukoj. Dum la lastaj jaroj aldoniĝis al Toruń alia interesaĵo.

En la proksima al Toruń vilaĝo Wielka Nieszawka (16 km de la urbo) estas aranĝita, la unua en Pollando, etnografia parko, prezentanta setligadon de olendroj, kiu disvolviĝadis en nia lando ekde la 16-a jarcento. Komence setlintoj - anoj de la protestanta grupo de menonitoj - venadis el Nederlando kaj Frizio. En la tolerema Pola Reĝlando ili ricevis specialajn privilegiojn kaj povis libere konfesi sian kredon. Poloj nomis ilin olendroj. Komence olendraj setlejoj organiziĝis en la norda Pollando, sur apudriveraj ebenaĵoj kaj novaloj, en la regiono Żuławy. Poste, la olendra kolonizado disvastiĝis suden, ĝis Mazovio. Laŭ la sama leĝsistemo setliĝis ankaŭ germanevenaj evangelianoj kaj poloj-katolikoj. La nomo „olendroj” estis uzata ankaŭ por tiuj setlintoj. Ĝis la 19-a jc., sur la polaj terenoj, surbaze de la „olendra leĝo”, estis fonditaj 15 500 vilaĝoj, en kiuj loĝis ĉ. 144 mil homoj. La mondmilitoj kaj la politikaj ŝanĝoj post la lasta mondmilito kaŭzis amasan elmigradon de tiu popolo de la polaj terenoj. Plej multaj menonitoj loĝas nun en USA, Kanado, Germanio kaj Nederlando. En Pollando ankaŭ eblas renkonti homojn, kiuj havas olendrajn radikojn. Diversaj menonitaj societoj kaj komunumoj ofte vizitas Pollandon. Ili daŭre strebas disvastigi ekumenismon kaj toleremon kaj konservi memoron pri sia historio.

Al la ĉirkaŭaĵo de Toruń la unuaj menonitoj venis fine de la 16-a jc. Ili estis lokitaj ankaŭ en la vilaĝoj Wielka Nieszawka kaj en Mała Nieszawka, kie ĝis nun konserviĝis ilia preĝdomo. Ekzistas dokumento, ke en la jaro 1603, la pola reĝo Sigismundo la Tria Vaza, donis al ili oficialan privilegion. La nuna olendra parko troviĝas do en la loko, kie iam loĝis kaj laboris setlintoj de tiu popolo.

La parko estas rekonstruo de parto de la ĉevistula vilaĝo, loĝata de olendroj en la 19-a kaj 20-a jc. Sur la tereno de 5 hektaroj oni rekonstruis vilaĝstrukturon, kiu estis la plej karakteriza por la olendraj vilaĝoj sur la terenoj de Ebenaĵo de Malsupra Vistulo. Troviĝas tie 6 translokitaj loĝ-

kaj mastrumkonstruaĵoj el tiu tereno - la plej valoraj, jam lastaj arkitekturekzemploj, karakterizaj por la olendraj setlintoj. La ĉefaj konstruaĵoj, prezentas la biendomojn, kunligantaj sub unu tegmento loĝ-kaj mastrumadpartojn - bestejon kaj pajlejon. Tiutipaj domoj estis tre utilaj dum inundoj, oftaj en tiu regiono. Dum inundoj, la loĝantoj povis vivi dum kelka tempo, sen neceso foriri eksteren. En kuir- kaj loĝĉambroj estas eksponataj diversaj originalaj mebloj kaj interesaj tabuloj kun citaĵoj el la luterana Biblio, sentencoj kaj proverboj. En iu ĉambro konserviĝis parte malnova tapeto kun interesaj desegonmotivoj. La biendomoj estas ĉirkaŭitaj per legom- kaj florigardenetoj. Proksime etendiĝas fruktoĝardenoj, grenkampoj kaj herbejoj. Diversaj partoj estas dividitaj per sekigfosaĵoj, bordigitaj per salikoj. Estas rekonstruitaj ankaŭ kelkformaj plektobariloj, karakterizaj por inundterenoj. Al la parko apartenas ankaŭ ordigita, originala ewangelik-menonita tombejo, lokigita sur monteto apud la iama vilaĝo.



La parko estas filio de la Etnografia Muzeo en Toruń, por esperantistoj konata precipe pro tio, ke ĝi, ek de la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento, uzas Esperanton por sia populariga laboro. Dum 20 jaroj (1980-2000) okazadis tie. "Internaciaj Renkontiĝoj de Popolaj Orkestroj kun Uzo de Esperanto kiel Pontlingvo". La internacia lingvo estis uzata por organizo de tiu ĉi

aranĝo kaj estis aŭdebla de la muzea scenejo, kiam inter la urba publiko troviĝis esperantistoj.

Meritas ankaŭ mencii, ke la olendra etnografia parko estas unu el tri interesaj, subĉielaj ekspozicioj de la toruna etnografia muzeo. La muzeo troviĝas en la centro de la urbo, en la iama urba arsenalo. Apude etendiĝas la etnografia parko, prezentanta la vilaĝan arkitekturon el la nordaj regionoj de Pollando: loĝdomojn, mastrumadkonstruaĵojn, vent- kaj akvomuelejojn. En la granda grenejo, devenanta de la riĉa, nobelula bieno, estas aranĝataj potempaj muzeaj ekspozicioj. En la parko okazas diversaj aranĝoj, prezentantaj laboron kaj artaĵojn de vilaĝaj artistoj kaj metiistoj. En la apuda amfiteatro prezentiĝas folkloraj muzik- kaj dancgrupoj. La tria etnografia parko, apartenanta al la muzeo, troviĝas ĉe Vistulo, en la apudurba vilaĝo Kaszczorek (11 km de la urbocentro). Tie eblas ekkoni fiŝistkampanan bienon kaj ekspozicion de diversaj objektoj, kunligitaj kun fiŝistaj okupoj kaj akvaj laboroj. Ĉiuj ĉi lokoj estas interesaj edukejoj kaj samtempe ripozejoj en la refreŝiga naturo.



En la etnografiaj parkoj ĉiuj vizitantoj estas gvidataj de la lokaj muzeanoj. Post la speciala interkonsento, estas ebleco viziti la ekspoziciojn kun ĉiĉeronado en Esperanto.

Informkontakto: e-mail [ope@etnomuzeum.pl](mailto:ope@etnomuzeum.pl) \* [www.etnomuzeum.pl](http://www.etnomuzeum.pl)  
Venu, vizitu kaj ĝuu!

## Izrael Lejzerowicz - radikala esperantisto – 1-a parto

Izrael Lejzerowicz naskiĝis, evidente kiel judo, la 4-an de junio 1901, en Lodzo, kiu troviĝis en la parto de Pollando kaj estis tiutempe regata de Rusio. En tiu urbo vivis, simile al pluraj aliaj polaj urboj, granda nombro da judoj. Ĝi havis en septembro 1939, tuj antaŭ la eksplodo de la Dua Mondmilito, entute 700.000 loĝantojn, el kiuj 233.000, do ĉirkaŭ triono, estis judoj. Sed ĝi estis diferenca de ekzemple Bjalistoko, la fama devenloko de Zamenhof. Lodzo, situanta multe pli okcidente, estis prospera industria urbo, la centro de la pola teksindustrio.

Izrael Lejzerowicz en 1930. Fonto: Bildarkivo Aŭstria



Lejzerowicz versis pri ĝi jene: *Nigra urbo fumkovrita, vomas ŝviton de gefiloj, Al ĉielo portas ĝemojn de malsato kaj malfort*<sup>3</sup>

Lodzo karakteriziĝis en la 19-a kaj frua 20-a jarcento per ne senkonflikta, sed ĝenerale fruktodona kunvivado de poloj, germanoj kaj judoj. Ĝi demonstris, ke en tiu orienteŭropa regiono ja povis estiĝi specifa multetna socio.<sup>4</sup>

Ni ne scias ekzakte, kiam Lejzerowicz lernis Esperanton. Li mem tion ne bone memoris en junio 1934, kiam li skribis, ke kiel 11- aŭ 12-jara knabo li iĝis esperantisto – do verŝajne en 1912 aŭ 1913. En 1913 registriĝis esperantista grupo en Lodzo, kaj eble Lejzerowicz jam apartenis al ĝiaj membroj. Post la milito, je kies fino restariĝis sendependa Pollando, li estis plenaĝa kaj pli kaj pli aktivadis por Esperanto. Fine de 1921 li iĝis prezidanto de nove fondita junulara sekcio de

---

<sup>3</sup> Represita en: Zofia Banet-Fornalowa, *La pereintoj in memoriam*, Czeladź: Hejme, 2003, p. 216. Vd. samlibre la kontribuon de la aŭtorino pri Lejzerowicz, "Fidela apostolo li estis...", pp. 194-212. – Valoras aldoni, ke ankaŭ la granda pola lirikisto Julian Tuwim (1894-1953) naskiĝis en Lodzo kaj poezie verkis pri sia hejmurbo. Antaŭ la Unua Mondmilito li lernis Esperanton kaj tradukis el ĝi poemojn. Lejzerowicz siavice esperantigis poemojn de Tuwim, vd. ekzemple *Literatura Mondo* III, 1. 1931, n-ro 7, pp. 134, 145.

<sup>4</sup> Jurgen Hensel, ed., *Polen, Deutsche und Juden in Lodz 1820-1939*, Osnabruck: Fibre, 1999.

Lodza Esperanto-Societo kaj komencis redakti kaj eldoni *Junulan Voĉon*, manskribitan, hektografitan bulteneton.

En 1929 estis fondita nova Lodza Esperanto-Societo, kiu tuj havis gravan taskon, ĉar ĝi invitis, por 1930, la Kvaran Kongreson de Polaj Esperantistoj. Lejzerowicz estis ĝenerala sekretario de la kongresa organiza komitato. Kredeble ŝuldiĝis grandparte al li, ke la kongreso, kiun partoprenis ankaŭ Felikso kaj Lidja Zamenhof, havis bonan publikan eĥon.

En adreslibro de polaj esperantistoj, aperinta en 1931, Lejzerowicz estas indikita kiel komercisto. Sed *Enciklopedio de Esperanto* (1933/34) nomas lin “ĵurnalisto, komercisto” kaj cetere notas pri li: “Gvidanto de la E-movado en Lodz kaj unu el la plej agemaj e-istoj en Pollando.”

Tamen, Lejzerowicz ne estis nur loka kaj landa aktivulo. Lin allogis – kiel multajn aliajn en lia generacio – la internacieco de Esperanto aŭ, pli konkrete, la homarana ideo, la celo de egalrajteco trans la limoj de nacio, religio kaj lingvo. Estante judo, li kaptiĝis de tiu ideo pro motivoj, kiuj similis al tiuj de Zamenhof mem kaj kiujn dividis proporcie tre alta nombro de la frutempaj pioniroj de la Esperanto-movado, precipe en la orienta Eŭropo. Li mem skribis, ke por li, kiel knabo apartenanta al diskriminaciata gento, “tia movado, por kiu ne ekzistas diferencoj rasaj nek naciaj, [...] nepre devis imponi kaj ŝajni revelacio”. Li daŭrigis: “Estas kompreneble, ke tia knabo kun sia tuta junula fantazio kaj amo fordonis sin al la Afero, ke li kun blinda obstino ekbatalas por ĝi, plena de firma kredo kaj fido, ke batalante por Esperanto, li batalas ne nur por idiomo, pli bona ol Volapük aŭ Ido, sed ankaŭ kaj super ĉio por ideo, pli ĝuste: por idealo, kiun tiu lingvo portas en si... por la Zamenhofa idealo.” Lejzerowicz, denove, simile kiel Zamenhof kaj multaj judaj esperantistoj, konsciis, ke estas konsilinde ne tro multe akcenti la specife judajn esperojn ligitaj kun Esperanto (“ĉar ‘tio povas malutili’ al nia afero”), sed – retrorigardante en la jaro 1934 – iom kontente konfesis, ke “interne de la movado juda esperantisto sentis sin preskaŭ egalrajta”.<sup>5</sup>

Tamen, diference de Zamenhof, kiu post la publikigo de la Unua Libro ne volis publike ligiĝi kun cionismaj aŭ similaj jud-emancipaj celadoj, Lejzerowicz almenaŭ portempe aktivis por aparta organizo de judaj esperantistoj. Post du malsukcesaj provoj, dum la 17-a Universala Kongreso (UK) en Ĝenevo (en 1925) estis fondita nova Hebrea Esperanto-Asocio. La fama folkloristo Immanuel Olsvanger (1888-1961) iĝis honora prezidanto, sed la gvidan kaj administran laboron transprenis, kiel prezidanto, Lejzerowicz. Li publikigis en 1926 jidlingvan lernolibron de Esperanto kaj en 1927 jidan “ŝlosilon” de Esperanto. En 1927 aperis lia traduko de la fama jud-mistika dramo *Dibuk*, originale verkita hebree de Ŝ. An-ski. El la jida li tradukis en Esperanton la romanon de Ŝalom Asch, *La sorĉistino el Kastilio* (1933). Tamen, ŝajnas, ke tiu HEA ne estis pli sukcesa, ol ĝiaj antaŭuloj.<sup>6</sup>

---

<sup>5</sup> I. Lejzerowicz, “Mi estas Judo...”, *Nia Gazeto* 1. 1934, n-ro 5, p. 2; represita en Banet-Fornalowa, *La pereintoj*, pp. 217-220.

<sup>6</sup> Ulrich Lins, “Judoj kaj la Esperanto-movado”, *La Gazeto* 21. 2006, n-ro 126, p. 12-14.

Ĉiuokaze, Lejzerowicz estis tro esperantista por ekskluzive aŭ eĉ nur unuavice agadi por judaj aferoj. Li iom post iom iĝis certagrade konata ankaŭ en la internacia movado. Jam en 1923, li iĝis membro de la Lingva Komitato. Kaj per artikoloj li regule kontribuis al Esperantaj gazetoj, al *Pola Esperantisto*, *Heroldo de Esperanto* kaj *Literatura Mondo*. La temo de tiuj artikoloj estas ĉefe la ĝenerala Esperanto-movado, kies disvolviĝo Lejzerowicz akre observas. Li precipe atentis la idean flankon de la movado kaj, ekzemple en la artikolo, aperinta komence de 1928, turnas sin kontraŭ “senideiĝo” de Esperanto kaj kontraŭ “neŭtralismo”, kiu “evitas ĉian liberan spiron, ĉian noblan altidean ekscitiĝon, sufokiĝante en maro da ‘artikoloj’ [...], kiuj plej ofte interesas sole turistojn”, kaj li kontraste memorigas pri la Zamenhofa kompreno de neŭtraleco, kiu “ne timis ofendi la ŝovinistojn kaj nomi ilin, laŭ ilia vera, malpura nigra nomo” – la neŭtralismo de Zamenhof estis alta idealo, “kaj nun liaj disĉiploj malaltigis ĝin ĝis parodio”.<sup>7</sup>

Lejzerowicz mencias la ambicion de kelkaj aktivuloj disponigi al la movado programon. Tion li malrekomendas, preferante, ke la movado disvolviĝu “konforme al la spirito, kiu vivigis kaj edukis ĝin”. Programo “paralizus” la agadon, “ni ne povas fidi je sekaj argumentoj”. Li deklaras, ke “kie Esperanto estas traktata sole kiel lingvo, tie veraj esperantistoj tute ne ekzistas”, kaj nostalgie memorigas pri la pionira epoko, kiun regis “belega nedefinita sento” – kiam la “Esperantistaro mem estis la ‘reunuigita homaro’ en miniaturo”.<sup>8</sup> Pri la Esperanta idealismo Lejzerowicz ofte komprenigis, ke ĝi “estis la prakaŭzo de la Esperanta lingvo”.<sup>9</sup> Malgraŭ emo iom glori la pasintecon, Lejzerowicz restas firme enradikiĝinta en la nuntempo. Li primokas tiujn, kiuj pro false komprenata “fundamentismo” batalas kontraŭ neologismoj, kaj montras bonan komprenon por la bezono de celkonscia organizita agado, vokante (en 1932) al mondskala kampanjo – en la formo de subskribo-kolektado – por la enkonduko de Esperanto en lernejojn.

Ĝis la komenco de la tridekaj jaroj, Lejzerowicz atingis ioman renomon kiel bonstila polemikisto<sup>10</sup>, sed liaj temoj – ĉefe primovadaj – ankoraŭ ne multe levis lin el la amaso de la pli aŭ malpli lertaj publicistoj de Esperantujo. Pli multe atentata, eĉ certagrade populara li iĝis per sia verketo *El la “Verda Biblio”* (1935)<sup>11</sup>, kiu

---

<sup>7</sup> Izrael Lejzerowicz, “Iom pri neŭtraleco”, *Heroldo de Esperanto* 9. 1928, n-ro 446, p. 1.

<sup>8</sup> I. Lejzerowicz, “Programoj kaj ideoj”, *Pola Esperantisto* 22. 1928, n-ro 2, pp. 4-5.

<sup>9</sup> I. Lejzerowicz, “La verda sopiro”, *Heroldo de Esperanto* 11. 1930, n-ro 584, p. 1.

<sup>10</sup> 8 En la eseo “Originala aŭ tradukita literaturo?”, *Literatura Mondo* II, 1. 1931, n-ro 4, pp. 71 -72, Lejzerowicz esprimas sin skeptike pri la ŝanco krei kvalitan Esperantan literaturon kaj laŭdas la riĉigan kontribuon per bonegaj tradukoj el la tutmonda literaturo.

<sup>11</sup> Izrael Lejzerowicz, *El la “Verda Biblio” kaj Babiladoj kun Horaĉo Serĉer*, Budapeŝto: Literatura Mondo, 1935. – Estas reeldonoj en 1978, 2007 kaj 2014. La kvaran eldonon recenzis Fernando Pita, *Esperanto* 110. 2017, n-ro 4, pp. 82-83. Unuaj provoj de tiu satiro aperis ekde 1928 en *Heroldo de Esperanto* kaj *Literatura Mondo*.

estas satiro elpikanta malfortajn punktojn de la movado, sed klare montranta, kiom ame la aŭtoro rilatis al ĝi. Bela ekzemplo por lia sinteno estas ankaŭ la artikolo “Kabeoj”, kiu estas ĉarma omaĝo ne al “etanimaj kabeoj”, sed al la dekmiloj da entuziasmaj laborantoj por Esperanto: “Venos foje la tago, kiam al la Nekonata Esperantisto estos starigata impona monumento.”<sup>12</sup>

Ofte Lejzerowicz verkis optimisme. En 1932 li konstatas, ke estas tre multaj homoj, kiuj “principe” subtenas Esperanton, ke “malamikoj aŭ kontraŭuloj preskaŭ ne ekzistas”.<sup>13</sup> Tion li skribis en *Pola Esperantisto*. Aliflanke, en *Heroldo de Esperanto*, direktita al internacia publiko, li jam en oktobro 1931 atentigas, ke apud la kontraŭuloj de la lingvo ekzistas aparta klaso de homoj, kies “sinteno koncernas ne nian lingvon, sed nian movadon, kiun ili terure malamas”: “Ili vidas en ni agentojn de kaŝitaj potencoj internaciaj, minacantaj renversi la beatan ordon de la mondo.” Tiuj kaŝitaj potencoj estas “framasonoj, judoj kaj bolŝevikoj”. Lejzerowicz aludas precipe al agitado okaze de la 23-a UK en Krakovo.<sup>14</sup>



Lodzaj esperantistoj antaŭ la trajnveturo al UK 1931 en Krakovo. 4-a de maldekstre: Izrael Lejzerowicz.

---

<sup>12</sup> I. Lejzerowicz, “Kabeoj”, *Heroldo de Esperanto* 13. 1932, n-ro 703, p. 1.

<sup>13</sup> I. Lejzerowicz, “Propaganda sugesto”, *Pola Esperantisto* 26. 1932, n-ro 2, pp. 13-14 (cit. p.

<sup>14</sup> 12 I. Lejzerowicz, “Nigraj semantoj”, *Heroldo de Esperanto* 12. 1931, n-ro 640, p. 1.



Komence de 1933, en Germanio, la nazioj akiris la potencon. Lejzerowicz tiutempe finis la preparlaboron por publikigo de la romano *La sorĉistino de Kastilio*, kies temo estas la persekutado de judoj fare de la mezepoka inkvizicio. Sian antaŭparolon al la traduko Lejzerowicz komencas citante la eldiron de Heinrich Heine, “La judeco estas malfeliĉo”. La libron mem Lejzerowicz nomas “protesto de sendependa penso kontraŭ fanatikeco, de kulturo kontraŭ spirita mallumo, de toleremo kontraŭ malamo” kaj “signalo je aspiroj pli noblaj kaj rilatoj pli homecaj”. Lejzerowicz ne povis antaŭscii, ke, kiam aperos la libro, meze de Eŭropo estos establiĝinta reĝimo, kies agoj estis denove direktitaj kontraŭ judoj. Sed li estis inter la unuaj, kiuj rimarkis la epokan ŝanĝon, kaj li ne hezitis komenti ĝin. Li tion faris ne singarde aŭ atendeme, sed dekomence kun senrezerva malaprobo.

---

*Esperantistoj de la Filio de PEA el Gliwice.*

## Forpasis nia kluba kolegino



Kun granda malĝojo ni informas, ke mortis nia kolegino, esperantistino el la urbo Tychy - **Bogusława Bronowska**. Ŝi naskiĝis la 7-an de novembro 1962 kaj mortis la 17-an de marto 2021 estinte nur 58 jara.

Ŝi estis konata kiel simpatia, aktiva esperantistino. Oni povis renkonti ŝin dum multaj esperantistaj aranĝoj. Ŝi partoprenis en esperantistaj kongresoj, landaj kaj eksterlandaj aranĝoj. Bogusia estis entusiasmulo en E-movado, nomata “Esperanto-Sumoo”. Ŝi gvidis esperantistan grupon en sia urbo Tychy kaj samtempe estis membro de la Filio de PEA en Gliwice kaj aktivis en la Universitato de Tria Aĝo en Tychy. Ŝi volonte partoprenis en montaraj marŝadoj kaj ŝatis bicikli. Ĉiam ŝi estis helpema. Lastatempe ŝi grave malsaniĝis je kancero.

Entombiga ceremonio okazis lunde, la 22-an de marto, sur la urba tombejo Świerzyniec en Tychy.

Ripozu en la paco kara Bogusia.

## Aleksander Pecyna – la ekzemplo por imitado

Aleksandro estas vira nomo, devenanta de la greka, kiun plej ofte oni kunligas kun Aleksandro la Granda, pro lia soldata genio kaj interesiĝo pri kulturo. Aleksander Pecyna ne estis kruela reganto kaj ne havis multajn malavantaĝojn. Nia Aleksander eble havis neniujn malavantaĝojn kaj por ni li estis la Granda kaj tia li restos. ...



Aleksander Pecyna – nia modesta amiko, esperantisto forpasis la 19-an de januaro 2021. Li estis estrarano de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, persono kreiva, laborema kaj subtenanta ĉiujn iniciatojn de la organizaĵo. Li estis ankaŭ esperantisto, kiu revis povi dediĉi pli da tempo al Esperanto. Li havis belajn revojn, kiujn li jam ne realigos...

Li estis mirinda, ĉarma homo kun multaj talentoj. Li ĉiam bonkore helpis, pliriĉigadis niajn renkontiĝojn per sia ega scio, empatio kaj riĉa personeco. Al ĉiu leciono li estis solide preparita kaj klopodis riĉigi ĝian programon per iu surprizo, plej ofte per kanto. Li ravis per sia varma, agrabla voĉo. Li ludis gitaron, kiun speciale mendis ...

Aleksander fervore serĉis „kaŝejojn” partoprenante en la speciala tutmonda ludo “Geokaŝado”. Poste li prezentis al ni la fotojn el siaj belaj vojaĝoj. Kaj nun li mem kaŝis sin, malproksime ...

Malfacile estas akcepti pensojn, ke li jam ne estos inter ni ...

Aleksander, vi forpasis neatendite. Por ĉiam vi restos en niaj koroj kaj memoro. Ni estas dankemaj al la sorto, ke ni povis ekkoni vin, kunlabori kaj kune lerni. Vi estos por ni ekzemplo por imiti.

La estraro kaj membroj de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

*Vikipedio*

## Andrzej Pettyn eksterordinara esperantisto

En la aĝo de 83 jaroj forpasis Andrzej Pettyn, unu el la plej konataj voĉoj en Esperantujo. Andrzej Pettyn (naskiĝis la 19-an de aprilo 1938,

mortis la 23-an de aprilo 2021) estis fama kaj vaste konata en Esperantujo pola esperantisto.

Pettyn eklaboris kun la Esperanto-Redakcio de Pola Radio jam kiel junulo, en 1959. Post studoj pri pedagogio kaj laboro kiel instruisto, li fariĝis plentempa laboranto de Pola Radio en 1962. Entute li laboris pli ol 40 jarojn en ĝia Esperanto-Redakcio kaj dum 12 el tiuj jaroj samtempe en la finna redakcio. A. Pettyn aŭtoris ĉ. 50 lernolibrojn, vortarojn, ekzercarojn, legolibrojn kaj kasedojn kun parolekzercoj. Lia lernolibro *Ĉu vi parolas Esperante?* aperis ankaŭ en pluraj aliaj landoj. Li instruis Esperanton kaj prelegis pri ĝi, interalie en Pollando, Finnlando kaj Svedio. Li abunde tradukis kaj prezentis literaturajn tekstojn. Pettyn estis membro de UEA ekde 1958, delegito ekde 1959 kaj honora membro de UEA ekde 2005. Li estis komitatano 1974-1982, 1986-1992 kaj 1995-2001, estrarano 1977-1980 kaj ano de la Lingva Servo de UEA 1986-1995. Ekde 1975 li estis membro de Akademio de Esperanto.

De pli ol 30 jaroj li kunlaboris kun la blindula komunumo, partoprenante en rehabilitadaj okupoj, babiladoj, registradoj de parolitaj libroj por blinduloj, kaj publikigis artikolojn en la brajla Esperanto-revuo "Pola Stelo".

Andrzej Pettyn popularigis sciojn pri la urbo Milanówek kaj kunfondis Societon de Amikoj de Milanówek. Li iniciatis krei kolekton de dokumentoj, dediĉitaj al la urbo Milanówek, ĝiaj homoj kaj eventoj kaj estis ankaŭ aŭtoro de kelkcent elsendoj kaj artikoloj pri Milanówek en Radio Bogoria, RdC, Pola Radio, loka gazetaro kaj interretaj portaloj.




Andrzej Pettyn en la Esperanto-Redakcio de Pola Radio ĉirkaŭ 1983



Andrzej Pettyn prelegas en Milanówek en 2016

## Bona homo Marek

Antaŭ kelkaj tagoj neatendite pro kancermalsano forpasis nia kolego Marek Pierkiej el Kety. Marek, estis tre simpatia, ĉiam helpema samideano kaj longjara estro de Esperanto-klubo en Andrychów apud Bielsko-Biała. Li estis tre aktiva esperantisto kaj montara vaganto, kiu kune kun anoj de la klubo "Amikeco" en Andrychów multfoje organizis ekskursojn de esperantistoj al la montopinto Leskowiec, partoprenis internaciajn renkontiĝojn sur la landlima montpinto *Czanotoria*, pilgrimadis kune kun aliaj esperantistoj tra la montoj *Szyndzielnia* kaj *Klimczok* al la sanktejo en *Szczyrk Górka* apud la „mirakla akvofonto”.



Marek kunorganizis la fotoekspozicion "Vojaĝoj de esperantistoj" en la kulturdomo en Andrychów kaj partoprenis multajn Esperanto-aranĝojn. Li estis spertulo pri natura medicino kaj mi esperis, ke iam povos prezenti prelegon pri la kuracherboj pri kiuj li sciis multon. Antaŭ jaroj li estis ankaŭ posedanto de konstruadfirmao kiun nomis „Esperanto Domo”. Kiam li ankoraŭ estis sana, ni planis kune organizi semajnfinan renkontiĝon de esperantistoj ĉe alia pinto en la Beskidy-montaro, bedaŭrinde tiuj niaj planoj jam ne efektiviĝos.

Krom tiuj ĉiuj aktivaĵoj li estis antaŭ ĉio tiu persono, pri kiu ni diras simple - bona homo. Li restos en nia memoro por ĉiam.

## Linguoscienca angulo

*Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*

### *Da* – bazaj reguloj

La rolvorteto *da* ligas kvantan aŭ mezuran esprimon al 0-vorta frazparto, kiu montras ion “substancecan” (ion nelimigitan kaj nedefinitan). La kvantesprimo montras, kiom troviĝas de la substanceca afero:

kvanto		“substantco”
<i>unu kilogramo</i>	<i>da</i>	<i>pano</i>
<i>litro</i>	<i>da</i>	<i>lakto</i>
<i>skatolo</i>	<i>da</i>	<i>rizo</i>
<i>amazon</i>	<i>da</i>	<i>komencantoj</i>
<i>du milionoj</i>	<i>da</i>	<i>rubloj</i>
<i>iom</i>	<i>da</i>	<i>valizoj</i>
<i>tiom</i>	<i>da</i>	<i>feliĉo</i>
<i>multe</i>	<i>da</i>	<i>problemoj</i>

- *Ŝi aĉetis faskon da ligno, iom da nigra pano, [iom] da malbonspeca faruno kaj [iom] da lakto.* M.182 La vortoj *fasko* kaj *iom* montras kvantojn. La *da*-esprimoj montras, el kio konsistas la diversaj kvantoj.

- *Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero.*

- *Ha, Dio nin gardu! Kia grandega amaso da oro!*
- *Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj.*
- *Mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo.*
- *La riĉulo havas multe da mono.*
- *Li havas pli da mono, ol li povas kalkuli.*
- *Nur nun ŝi eksentis, [...] kiom da fortoj forprenis de ŝi la malvarmo.*
- *Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo.*

*Da*-esprimo neniam estas komplemento de ĉefverbo, sed ĉiam rekta priskribo de ĉefvorto. Oni ne povas uzi memstarajn *da*-esprimojn, ekz.:  
*\*Sur la tablo troviĝas da butero.\* \*Ŝi aĉetis da faruno.\** Oni devas diri ekz.:  
*Sur la tablo troviĝas iom da butero. Ŝi aĉetis iom da faruno.* (Plej ofte oni tamen diru simple: *Sur la tablo troviĝas butero. Ŝi aĉetis farunon.*)

### **Nombrovortoj kaj *da*-esprimoj** ↵

Nombraj vortetoj aperas normale **sen *da*** kiel rekta priskribo de ĉefvorto:

- *Tie loĝas du esperantistoj.*
- *Mi havas cent pomojn.*
- *Tiu ĉi vilaĝo havas du mil loĝantojn.*

Nombrovortoj kun 0-finaĵo kiel *miliono*, *miliardo*, *deko* kaj *cento* tamen bezonas *da*. Ili aperas kiel ĉefvorto kun *da*-esprimo kiel priskribo:

- *Mi havas centon da pomoj.*
- *Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj.*
- *Li ĝin forblovas por dudeko da rubloj.*

## Ne uzu N-finaĵon post *da*

Post *da* oni ne povas uzi N-finaĵon, ĉar *da*-esprimo neniam estas mem objekto. La kvanta esprimo antaŭ *da* tamen povas esti objekto: *Li portas multon da valizoj.*

Sed la kvanta esprimo ofte estas kvanta E-vorto aŭ kvanta vorteto, kiu ne povas ricevi N-finaĵon, eĉ kiam ĝi rolas kiel objekto:

- *La riĉulo havas multe da mono.* = *La riĉulo havas multon da mono.*  
(Nepre ne: \**La riĉulo havas multe da monon.*\*)

- *Kiom da pano vi volas?* = *Kiel grandan kvanton da pano vi volas?*  
(Nepre ne: \**Kiom da panon vi volas?*\*)

## Literaturaĵoj

Robert Kamiński

### Jaro de Stanisław Lem



Vendrede, la 27-an de novembro, la pola parlamento elektis patronojn de la jaro 2021. Oni honoris sekvajn personojn: kard. Stefan Wyszyński, Stanisław Lem, Cyprian Kamil Norwid, Krzysztof Kamil Baczyński kaj Tadeusz Różewicz kaj anoncis, ke la jaro 2021 estos ankaŭ "Jaro de la Konstitucio de la 3-a de majo".

La Sejmo deklaris la jaron 2021 kiel "Jaro de Stanisław Lem" - verkisto, la plej elstara reprezentanto de la pola sciencfantazia literaturo kaj unu el la plej legataj sciencfikciaj verkistoj en la mondo, aŭtoro de, inter aliaj, "Ciberiadio", "Solaris" aŭ "Fabeloj de robotoj".

"En siaj konsideroj pri la kondiĉo de la moderna homo, la efikoj de teknologia kaj civiliza progreso, li rimarkis multajn fundamentajn aferojn por nuntempa kulturo. Li avertis pri la negativaj efikoj de la teknika disvolviĝo de la civilizo, kaj liaj teoriaj verkoj kaj futurologiaj prognozoj grave influas difinon de la loko de la homaro en la universo kaj antaŭdirojn pri la homa sorto" - diras la teksto de la parlamenta rezolucio.

Ĉi-jare, la 12-an de septembro, estos la 100-a datreveno de naskiĝo de la verkisto. Liaj verkoj estis tradukitaj al 41 lingvoj. Entute oni vendis pli ol

27 milionojn da liaj libroj. Inter la tradukoj de la verkoj estas ankaŭ tradukoj al Esperanto. Unu el ili ni decidis prezenti al niaj legantoj.

Foto: Wikipedia

*Stanisław Lem*

Tradukis *Jerzy Wałaszek*

## La blanka morto

La Arageno estis planedo konstruita direkte al sia interno, ĉar ĝia suvereno, Metameriko, kiu disvastiĝis sur la ekvatora ebena je tricentsedek gradoj kaj tiamaniere ĉirkaŭigis la tutan ŝtaton, estante ne nur ĝia sola reganto, sed ankaŭ ĝia ŝirmanto, volante defendi siajn subulojn, la Enteritojn, kontraŭ kosma invado, malpermesis pertuŝe movigi ion ajn, eĉ la plej etan ŝtoneton, sur la supraĵo de la globo. Pro tio estis la landoj de la Arageno sovaĝaj kaj senvivaj, nur fulmaj rompilegoj ĉirkaŭĉarpentis ŝtonajn montospinojn, kaj meteoritoj per krateroj skulptadis la kontinentojn. Sed dek mejlojn sub la supraĵo disvastiĝis la sfero de la diligenta laborado de la Enteritoj; kavigante la patran planedon ili plenigis ĝian internon per kristalaj ĝardenoj kaj urboj el arĝento kaj oro; konstruadis renversajn domojn, similajn al dudekedroj kaj ikosaedroj, kaj ankaŭ hiperbolajn palacojn, en kies spegulaj kupoloj ili povis sin speguli, pligrandigitaj dudekmiloble kiel en la teatro de grandeguloj – ĉar ili amegis la brilon kaj la geometrion, kaj estis tre lertaj konstruantoj. Per la sistemoj de subteraj tuboj ili transportadis al la interno de la planedo la lumon, kiun ili filtris unufoje per smeraldoj, unufoje per diamantoj kaj aliffoje per rubenoj, kaj dank' al tio ili laŭvole havis tagiĝon, tagmezon aŭ rozan vesperon; kaj tiel ili amegis siajn staturojn, ke spegula estis ilia tuta mondo; ili posedis kristalajn veturilojn, de la spiro de varmaj gasoj movigatajn, sen fenestroj, ĉar ili tutkorpe estis travideblaj, kaj la pasaĝeroj dumveturante povis sin mem vidi respegulitajn de la facoj de palacoj kaj temploj, kiel mirindaj multoblaj reflektajoj, tangantaj kaj spektrantaj. Ili eĉ posedis sian propran ĉielon, kie en araneaĵoj el molibdeno kaj tantalato ardadis spineloj kaj montaraj kristaloj, kiujn ili en fajro kulturadis.

La heredanta kaj samtempe eterna reganto estis Metameriko, ĉar li ekposedis malvarman, belan kaj multpartan korpegon, kaj en lia unua parto loĝis la menso; kiam ĝi maljuniĝis, post miloj da jaroj, kiam jam elviŝiĝis la kristalaj retoj pro grandregada pensado, ĝian funkcion prenis la sekvanta parto, kaj tiel tio ĉi ripetis, ĉar li posedis dek miliardojn da jenaj partoj, Metameriko mem estis la posteulo de Aŭrigenoj, kiujn li neniam vidis, kaj li sciis pri ili nur tio, ke kiam ekminacis al ili la perejo pro certaj teruraj estaĵoj, kiuj okupadis sin pri la kosmnaĝado kaj por ĝi ili forlasis siajn gepatrajn sunojn, enmetis la Aŭrigenoj sian tutan scion kaj vivdeziron en malgrandetajn atomajn erojn, per kiuj ili fekundigis la rokan grundon de la Arageno. Tiun ĉi nomon ili uzis por nomi la planedon, ĉar ĝi similis ilian propran

gentan nomon, sed eĉ per ilia fera piedo ili ne kuraĝis tuŝi ĝiajn rokojn, por ne alvenigi pro jena postsigno siajn terurajn persekutantojn; ili ĉiuj pereis, ĝojante nur por tio, ke iliaj malamikoj, nomitaj blankuloj aŭ paluloj, eĉ ne devenas, ke la pere de la Aŭrigenoj ne estis tute kompleta.

La Enteritoj, kiuj el Metameriko estis kreitaj, ne posedis lian scion pri sia propra neordinara deveno: la historio pri la terura fino de la Aŭrigenoj kaj samtempe pri la komenco de la Enteritoj estis enskribita en la nigran prakristalon vezuvianan, kaŝitan en la vera kerno de la planedo. Des pli bone sciis ĝin kaj memoris ilia reganto. El roka kaj magneta grundo, kiun elrompadis la bravaj konstruantoj, pligrandigante sian subteran reĝlandon, ordonis Metameriko fari vicajn da rifo, ĵetatajn en la vakuo. Per infernaj cirkloj ili ĉirkaŭflugadis la planedon, ne permesante la atingon al ĝi. Do evitis stelajflugantoj jenan ĉirkaŭaĵon nomitan la Nigra Sonserpento, ĉar tiel ofte karamboliĝis grandegaj ŝtupoj da bazaltoj kaj porfiroj, komencigante multajn torentojn da meteoritoj, kaj estis jena loko la fonto de ĉiuj kometaj kapegoj, de ĉiuj bolidoj kaj asteroidoj ŝtonaj, kiuj polve enŝutiĝas la tutan sistemon de Skorpio. La meteoritoj ankaŭ bategis per ŝtonaj falajegoj la grundon de Arageno, bombardis ĝin, sulkigis kaj displugigis per fontanoj da fajrecaj kolizioj, ŝanĝante nokton al tago, kaj tagon – per polvonuboj – al nokto. Sed eĉ la plej malgranda vibrado ne atingis la ŝtaton de la Enteritoj; kiu ajn kuraĝus alproksimiĝi ilian planedon, ekvidus, se ne pli frue frakasu la ŝipon pro la rokaj kirloj, la ŝtonan globon similan al la kranio truita de krateroj. Eĉ la enirejon, gvidantan al la subteraĵon, faris la Enteritoj simila al disŝiritaj rokoj.

Dum jarmiloj neniu vizitadis la planedon, sed tamen Metameriko ne malstreĉis eĉ je unu palpebrumo la ordonojn de la severa atento.

Tamen okazis, ke unu tagon la grupo de la Enteritoj, kiu supreniris la supraĵon, ekvidis kvazaŭ gigantan kalikon, per sia trunko enfiksita en roka amasigo, kies direktita al la ĉielo konkaveco estis multloke frakasita kaj truita. Oni tuj alvenigis al tiu ĉi loko la multsciulojn-stelflugantojn, kaj jenaj verdiktis, ke antaŭ ili estas la vrako de fremda stela ŝipo alveninta de nekonata malproksimaĵo. La ŝipo estis grandega. Nur demalproksime oni povis vidi, ke ĝi similas gracion cilindron kun la ŝipbeko enfiksita en la rokojn, ke kovras ĝin dika tavolo da brulaĵo kaj fulgo, kaj ĝia malantaŭa kalika parto konstruicie similas la plej grandajn arkaĵojn de subteraj palacoj. El subteraĵoj elkrablis la prenilhavaj maŝinoj, kiuj kun granda singardo eligis la enigman ŝipon el la loko de ĝia falo kaj enportis ĝin en subteraĵojn. Post tiam la grupo de la Enteritoj ebenigis la krateron, faritan de la ŝipbeko, por ĉiu postsigno de la fremda invado malaperu de la planeda supraĵo kaj la bazalta pordego estis bone fermita.

En la ĉefa esplora ermitejo, aranĝita kun brilanta lukso, ripozis la nigra, kvazaŭ sur karbbuloj fritita fuzelaĝo, kaj la esplorantoj, sciante la danĝeron, direktigis al ĝi la spegulajn surfacojn de la plej helaj kristaloj kaj per la diamantaj akraĵoj distranĉis la unuan, supraĵan kirason, sub kiu estis la dua, mirinde blanka, kiu ilin iomete ekstremigis, kaj post kiam ankaŭ tiun tavolon tramordis la



karborundaj boriloj, ili ekvidis la trian, netravedeblan tavolon, en kiu estis hermetike enfiksita pordo, sed ili ne kapablis ĝin malfermi.

La scienculo plej maljuna, Afinoro, esploris skrupule la seruron de jena pordo; montriĝis ke ĝi malfermu oni devis ĝin movigi per elparolita vorto. Ili ĝin ne konis kaj koni ne povis. Longan tempon ili provadis uzi diversajn vortojn, kiel "Kosmo", "Steloj", "Eterna Flugo", sed la pordo eĉ ne skuiĝis.

– Mi ne estas certa, ĉu ni bone faras penante malfermi la ŝipon sen la scio de la reĝo Metameriko – fine diris Afinoro. – Estinte la knabo mi aŭdis la legendon pri blankaj estaĵoj, kiuj persekutas en la tuta Kosmo ĉiun vivon, en metalo naskitan, kaj detruas ĝin pro la venĝo, ĉar...



Enteritoj venkitaj de morto  
Grafikaĵo: Viki CC-BY-SA

Ĉimomente li interrompis kaj kun la aliaj ekrigardis kun la plej granda teruro la mursimilan ŝipflankon, ĉar dum liaj lastaj vortoj la pordo, ĝis nun malviva, subite ekmoviĝis kaj disŝoviĝis tutlarĝe. La ĝin malfermanta vorto estis "Venĝo". Alvokis la scienculoj la kirasulojn kaj kun ili ĉeflanke, kiam la sparkjetilegoj estis pafipretaj, eniris la sufokan kaj senmovan mallumecon de la ŝipo, lumigante ĝin per lazuraj kaj blankaj kristaloj. La maŝinaro estis plejparte frakasita, longe do ili eraradis inter ĝiaj ruinoj, serĉante la ŝipanaron, sed ili nek trovis ĝin, nek iun ĝian postsignon. Ili konsideris, ĉu la ŝipo mem estis la inteligenta estaĵo, ĉar tiaj estaĵoj povas ja ekzisti,

ekzemple ilia reĝo mem estis miloble pli granda ol la nekonata ŝipo kaj estis la unuo. Sed la cirkvitoj de elektra pensado, kiujn ili trovis, estis etaj kaj disĵetitaj; la fremda ŝipo ne povus esti io alia ol la fluganta maŝino kaj sen la ŝipanaro estis tiel senviva kiel la ŝtono.

En unu de anguletoj de ferdeko, ĉe la kirasa muro, trafis la esplorantoj la disŝprucitan flakon, kvazaŭ el ruĝa farbo, kiu ekmakulis ilian arĝentajn fingrojn, kiam ili tie alproksimiĝis; el tiu ĉi flako oni ekstraktis la fibrojn de nekonata vestaĵo, malsekajn kaj ruĝajn, kaj ankaŭ iomete da splitoj, ne tro duraj, kalciaj. Ili ne

sciis kial, sed ĉiuj ektremis starante tie en la mallumo, nur per la kristallumo heligita. Kaj eksciigis la reĝo pri la aventuto, tuj alkuris liaj senditoj ordonante plej severa neniigi la fremdan ŝipon kun ĉio, kio en ĝi estas, kaj precipe ordonis la reĝo per atoma fajro bruli la fremdajn flugantojn.


Respondis la esplorantoj, ke en ĝi neniu estis, nur la mallumo kaj frakasitaj restaĵoj, feraj intestoj kaj polvo, per iometo da ruĝa farbo makulita. Ekskuis la reĝa sendito kaj tuj ordonis la atomajn stakojn bruligi.

– Je la reĝa nomo! – li diris. – La ruĝo, kiun vi trovis, estas la antaŭsigno de perejo! La blanka morto per ĝi vivas, kiu scias nenion alian ol la venĝo farita al la senkulpuloj nur pro ilia ekzisto...

– Se ĝi estis la blanka morto, ĝi jam nin ne minacas, ĉar la ŝipo estas senviva kaj kiu ajn flugis per ĝi, en la ringo de defendaj rifoj ekmortis – ili respondis.

– Senfina estas la povo de jenaj blankaj estaĵoj, ĉar se ili mortas, multoble ili renaskiĝas de nove, malproksime de fortaj sunoj! Faru vian devon, ho atomuloj!

La timo paralizis la saĝulojn kaj la esplorantojn, post kiam ili ekaŭdis tiujn ĉi vortojn. Sed ili ne ekkredis la profetaĵon de la perejo, ĉar tro malprobabla ŝajnis al ili ĉia ĝia ebleco. Do ili eltiris la tutan ŝipon el ĝia kuŝejo, sur platenaj amboj disrompis ĝin, kaj post kiam ĝi dispecetiĝis, mergis ĝin en dura radiado, ĝis ĝi iĝis miliardoj da flugantaj atomoj, kiuj eterne silentas, ĉar havas la atomoj nenian historion, ĉiuj estas egalaj unu al la alia, ĉu devenas ili el la plej helaj steloj, ĉe el senvivaj planedoj, ĉu el inteligentaj estaĵoj, bonaj aŭ malicaj, ĉar la materio estas la sama en la tuta Universo kaj ne al ĝi oni devas timi. Tamen ili kaptis tiujn ĉi atomojn, formigis el ili unu bulon glaciigitan, kaj forpafis ĝin al steloj kaj nur tiam ili diris al si mem kun kvietigo: – Ni estas savitaj. Nenion povas okazi pro tio. Sed kiam platenaj marteloj batis la ŝipon, kaj jena estis dispecetiĝanta, el la vestaĵa fadeno, de la sango makulita, el diskudrita kunkudro elfalis nevidebla sporo, tiel malgrandeta, ke eĉ cent da jenaj povas esti kovritaj de unu sablero. Kaj el ĉi tiu sporo, dumnokte, en polvo kaj sablo, inter la ŝtonegoj de kavoj, elkoviĝis unu blanka ĝermo, kaj el ĝi la dua, tria, centa – el ili disbloviĝis acido kaj malsekeco, per rustaĵo atakante la tabulojn de spegulaj urboj, kaj interplektiĝis la malvideblaj fadenoj, naskitaj en malvarmaj intestoj de la Enteritoj, kiuj matene ekleviĝante, jam portis morton en si. Kaj post unu jaro ili ĉiuj mortofalis. Senmoviĝis la maŝinoj en kavoj, estingiĝis la kristalaj fajroj, brunruĝa lepro detruis la spegulajn kupolojn, kaj kiam forkuris la lasta atoma varmo, ekregis la mallumo ĉirkaŭe, en kiu pligrandiĝadis, penetrante la knarantajn skeletojn, enirante la rustigitajn kraniojn, kovrante la senvivajn okulkavojn – la *lanuga, malseka, blanka ŝimo*.



Germain Pirlot

## Lerni la ciferecon kaj lerni ciferece

En belga ĵurnalo ekaperis interesa artikolo pri la ĝeneraligo de cifereca instruado en lernejoj, i.a. pro la kronviro, laŭ la d-ro Benoit Galand, profesoro pri edukaj sciencoj en la Universitato de Louvain (Loveno, Belgio).



Laŭ li estas granda diferenco inter **lerni la ciferecon** kaj **lerni ciferece**. Fakte, la interagado ebligita de ĉi-tiu ilo rapide tro ŝarĝas la atenton kaj labormemoron. Studoj montras, ke studentoj ĝenerale lernas malpli bone ol per papera komunikilo. Krome, kaŝitaj kostoj estas ligitaj al la vasta uzo de cifereca teknologio en la lernejo. Nepras aĉeti la aparataron kies kostoj estas nur parto de la ciferecaj kostoj. Oni ankaŭ devas pensi pri regulaj ĝisdatigoj kaj la rapida malnoviĝo de la komputila aparataro. Sen menci, ke por produkti komputilojn kaj tabulkomputilojn oni devas ĉerpi maloftajn minaĵojn, malgraŭ mediaj reguloj. Krome, la malnovaj komputiloj kutime estas lokigataj en rubodeponejoj en sudaj landoj.

Sed, kian lokon oni devas doni al la cifereca lernado en edukado? Estas vigla debato inter tiuj, kiuj diras, ke estas ĉefprioritato renkonti hodiaŭajn edukajn defiojn kaj la bezonojn de nia ekonomio, kaj tiuj, kiuj kredas, ke ĝi estas minaco por la intelekta disvolviĝo kaj sano de niaj infanoj. Laŭ prof. Galand, la celo de tiu teksto estas resumi studojn pri la efikoj de cifereca teknologio ĉe studentoj. Pli konkrete, sep aktualaj ideoj ĉirkaŭ cifereca formo en edukado estas diskutitaj: 1) la interagado kaj plurmedia naturo de la cifereca akcelado; 2) cifereca teknologio antaŭenigas aŭtonomion de lernantoj; 3) cifereca pli instigas; 4) videoludoj kaj programado permesas disvolvi transversajn kapablojn; 5) scioj haveblas interrete, do ne necesas instrui kaj lerni ilin; 6) la hodiaŭaj lernantoj esence diferencas de tiuj, kiuj venis antaŭ ili; 7) cifereca teknologio ebligas malaltigi la kostojn de edukado. La rezultoj indikas, ke ĉi-tiuj ideoj plejparte eraras. Koncerne la lernadon, cifereca ŝajnas nek pli bona nek pli malbona ol alia ilo aŭ rimedo, sed havas kaŝitajn kostojn, kiuj ofte estas malmulte menciataj.



## Leterkesto



*James* el Brazilo, [sudastelaro@gmail.com](mailto:sudastelaro@gmail.com), Filatelista peto.

Mi ŝatus akiri, por mia pretigata ekspozicio, ekzempleron de koverta aŭ karto kun la pola stampo "necenzurita" el 1981-82, sur videble esperantlingva korespondaĵo, enirinta Pollandon. Per la vorto "videble" mi komprenas iun esperantlingvan signon, ekzemple simplan vorton "sinjoro" aŭ "Pollando" tajpe aŭ manskribita.

Kompreneble, ankaŭ la stampoj "cenzurita" estas bonvenaj! Ĉu estas en la reto iu grupo de polaj esperantistoj, al kiuj mi povus sendi tiun peton? Eble iuj havas ion tian konservita kaj ŝatus doni bonan celon al ĝi. Mi pretas aĉeti aŭ interŝanĝi kontraŭ io. La materialo eniros mian ekspozicion pri E-korespondaĵoj, kiuj trairis cenzuron en la mondo. Per tiu ekspozicio mi informas internacian publikon kaj aparte filatelistojn pri la poŝta historio.



*Andree Grossmann*, Invito al Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj

La faka asocio TAKE eldonas ĉiujare sian jaran revuon: "KONSTRUADO-kajero de TAKE".

En 2020 el Ĉinio la asocio ricevis libron en la ĉina kaj en Esperanto kun la titolo "Ŝtonaj fenestroj". Tio instigis la redaktoron elekti kiel ĉefan temon por 2020 "Fenestroj". La tuta artikolo rilatas al "Antikvaj fenestroj en Ĉinio". En tiu regiono de Ĉinio, pro pratempaj mitoj kaj legendoj, saĝaj ŝtonistoj en montaro ĉizis ŝtonojn kaj faris el ili artverkojn kun diversaj simbolaj signifoj.

En 2021 estis elektita la temo "Akvo". Tio



estas tre vasta temo, kiu povus plenigi plurajn numerojn. Iuj rilatas al diversaj landoj Brazilo, Respubliko de Kongo. Ĝuste en tiu lando, dank'al kunordigado kun esperantistoj de la asocio AVE, progresis la projekto pri akvo-provizado en Kalima. En la numero de 2018 aperas artikolo pri la katedralo de Vroclavo.

Normala jara abonkoto estas 20 eŭroj, subtena koto 9 eŭroj. Eblas mendi antaŭajn numerojn de la jenaj jaroj: 2016-2020, kaj jarkolektojn: 2006-2012, 2015

En nia redakcia retejo: <http://take.esperanto.free.fr> vi povas elŭti antaŭajn numerojn de "KONSTRUADO-KAJERO", trovi la enhavon de la diversaj numeroj kaj eĉ elŭti apartajn artikolojn kaj trovi informojn pri abonkotoj.

Bonvolu sam-okaze informi pri via pago al: [andreo.ag16@sfr.fr](mailto:andreo.ag16@sfr.fr)



*Jerzy Dryja*, La eldonaĵo de "Pollando" informas pri Zamenhof.

Mi hazarde trovis en la reto la jenan materialon. Tio estas lernolibro por lernado de la pola lingvo por fremdlandanoj kaj homoj poldevenaj. La libron eldonis „Pollando” - la Lernejo de la Pola Lingvo kaj Kulturo en Bjalistoko. En la libro aperis informoj pri Bjalistoko, Ludviko Zamenhof kaj Esperanto. Ĉu vi sciis pri tio?



## Kalendaro

### Esperanto-aranĝoj en Pollando en 2021

19 - 23 05. 2021	Polyglot Gathering (Plurlingva kunveno) en Teresin	Kvintaga evento kun prelegoj, laborsesioj kaj sociumado por plurlingvuloj <a href="http://www.polyglotgathering.com/">www.polyglotgathering.com/</a> <a href="mailto:info@polyglotgathering.com">info@polyglotgathering.com</a>
21.-24.05. 2021	Virtuala Germana Pola Esperanto-kongreso Fervoista E-kongreso 2021	Pola Esperanto-Asocio Germana Esperanto-Asocio Internacia Fervojistaj Esperanto Federacio

23.07-1.08.2021	Pol'and'Rok - PollandRok (eks-Woodstock) Memzorga renkontiĝo de mojosaj, festemaj esperantistoj kadre de la senkosta rokmuzikfestivalo	<a href="http://krokodilo.de/woodstock/woodstock.php">http://krokodilo.de/woodstock/woodstock.php</a> andim(ĉe)gmx.li
25.07-1.08.2021	94-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Bjalistoko SAT en Bjalistoko	Sennacieca Asocio Tutmonda Bjalistoka Esperanto-Societo sat@espero.bialystok.pl
12.09.2021	9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021 - koncerto de venkintoj	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado www.ecem.com.pl
28.12.2021 04.01.22	13-a Junulara Esperanto-Semajno JES en Wittenberg (Germanio)	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl

## Universalaj Kongresoj de UEA

17-24.07.2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Bel fasto (Nord-Irlando) Okazos en 2021	Universala Esperanto-Asocio uea.org
1-8.08.2022.	La 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado). En 2020 nur okzis virtuala kongreso UK en tradicia formo UK okazos en 2022	Universala Esperanto-Asocio uea.org

## Elektitaj renkontiĝoj en najbaraj landoj

9.17.07.2021	Somera Esperanto-Studado (SES) okazos en Kroměříž Ĉeĥio	E@I, Februárová 2, SK-958 01 Partizánske, Slovakio ses@ikso.net
3.-10.06.2021	Baltaj Esperanto-Tagoj (BET-56) en Jelgava, Latvio	Latvia Esperanto-Asocio margarita.zelve(ĉe)gmail.com
17-21.10.2021	9-a EMA Esperantista Migrado Aŭtuna en la Palatinata Arbaro, okcidenta Germanio	<a href="http://www.esperanto.de/eo/ema-eo">www.esperanto.de/eo/ema-eo</a> , ema@esperanto.de
26.07-1.08.2021	77-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Kijevo, Ukrainio	<a href="http://ijk2021.retejo.info/#">http://ijk2021.retejo.info/#</a> , tejoofficejo@gmail.com

Andreo Bach

### Kukurba supo kun pastaĵetoj

Infanaĝe, kun la granda scivolemo kaj kun la infaneca ekscitemo, mi kaj miaj fratoj kunsidadis familie ĉe nia kuireja tablo, por rigardi, kiel nia patrino distranĉas la kukurbon, ĵus ricevitane de iu parenco aŭ najbaro. Tiutempe, bonŝance, abundis ĉedomaj ĝardenetoj kaj mi memoras diversajn bongustajn manĝaĵojn el tiu legomo. Nuntempe kukurbo estas facile trovebla ankaŭ en vendejoj, do mi volas prezenti recepton por prepari ŝatatan de mi, bongustan (dolĉan) kukurban supon. La recepto estas simpla:

Oni devas distranĉi la elektitan frukton, por kio necesas granda kaj akra tranĉilo, precipe, ke ne estas facile detranĉi ties malmolan ŝelon. Krome, oni devas purigi la



internon de la granda frukto – forigi la molan pulpon kun eĉ kelkcent kernoj. Post tio mi tranĉas la kukurbon en kubetojn. Sekve, dum ĉ. 20 minutoj, mi boligas ilin en negranda kvanto de iom saligita akvo, ĝis la kubetoj fariĝos „vitrecaj”. Samtempe mi preparas pastaĵojn. Mi prenas duonkilogramon da tritika faruno, aldonas du ovojn, pli ol 300 mililitrojn da akvo, iom da salo kaj miksas ĉion. Intertempe la akvo en poto komencas boli. Rekte el la ujo, per kulero, mi enmetas pecetojn de la miksaĵo al la bolanta akvo. Kiam ĉiuj pecetoj troviĝas jam en la poto, mi permesas al ili boli dum kelkaj minutoj. Mi elverŝas la akvon, kiu ne elvaporigis kaj ĵetas pastaĵetojn en la poton kun la kuirita kukurbo (en kiu restis iom da akvo), mi aldonas sukeron kaj iom da pulvorigita cinamo por la gusto, enverŝas glason da lakto kaj miksas ĉion. Estas bone, kiam la supo restos en la poto dum kelka tempo (ekz. duonhoron). Post tiu tempo ĝi estas ankoraŭ sufiĉe varma kaj jam sufiĉe bongusta. Vi povas konservi ĝin en poto en malvarmaejo aŭ en fridujo dum du tri tagoj kaj ĉiutage ĝui bongustan deserton


posttagmeze aŭ vespere. Ŝajnas al mi, ke la sekreto de la bongusteco de la supo „kuŝas” en la pastaĵetoj al kiuj akompanas la cetero de la ingrediencoj.

Aldone mi prezentas kelkajn informojn pri la deveno, historio kaj valoroj de tiu ĉi legomo:

La kukurbo, alivorte melopepo, devenas el la Meza Ameriko kaj ĝia historio atingas la antikvecon, kiam verŝajne la fame konata militestro, politikisto kaj frandulo – Lukullus regaligis siajn gastojn per la melopejo, fritita en mielo. Laŭvice la grekaj sciencistoj uzis la freŝe raspitan melopepon kun vino kiel rimedon kontraŭ obstrukcoj. Ĝi rapide populariĝis ankaŭ en Pollando, venigita al Eŭropo de Kolumbo, gastante egale sur la tabloj de la homoj noble kaj ordinare naskitaj. Verŝajne la manĝado de ĝiaj kernoj helpas la potenton. Inter la vitaminoj, kiuj troviĝas en la frukto kaj ĝiaj kernoj, oni povas listigi: A, B1, B2, C, PP kaj E. Krome, ĝi entenas kelkajn mikroelementojn: kalion, selenon kaj zinkon.



## Oni eldonis



Aŭtoro: Tivadar Soros  
„Maskarada wokół śmierci.  
Nazistowski świat na Węgrzech”  
El Esperanto al pola tradukis Emilia Ewa Siurawska  
Eldonato: Novae Res,  
Eldonjaro: 2021,

352 paĝoj, Formato: 130x210 mm  
ISBN: 978-83-8219-047-2



Aŭtoro: Marian Turwid  
”Dwie strony drogi Du flankoj de la vojo”  
Tradukis: Urszula

Tupajka, Bydgoszcz 2020,  
276 paĝoj



Ni rekomendas interesan retpaĝon  
<https://mondmilito.hypotheses.org/>



La 19-an de januaro 2021 en Wrocław forpasis samideano,  
**Aleksander Pecyna.**  
Kun la granda malĝojo, Małgorzata Komarnicka el Eŭropa Centro de  
Interkultura Edukado

La 17-an de marto 2021 en Tychy forpasis samideanino,  
**Bogusława Bronowska.**  
La entombiga ceremonio okazis la 22-an de marto  
sur la tombejo Świerczyniec ĉe la str. Barwna en Tychy.  
Kun la granda malĝojo, esperantistoj el la PEA-filio en Gliwice

La 14-an de aprilo 2021 en Kęty forpasis samideano  
**Marek Pierkiel.**  
La adiaŭa ceremonio okazis la 16-an de aprilo sur la tombejo  
ĉe la str. Cmentarna en Kęty. (N-2/4/8).  
Kun la granda bedaŭro, esperantistoj el la PEA-filio en Bielsko-Biała

La 23-an de aprilo 2021 en Milanówek forpasis eminenta esperantisto  
membro de Akademio de Esperanto, instruisto, redaktoro de Esperanto-  
redakcio de Pola Radio, historiisto **Andrzej Pettyn**  
La funebra ceremonio okazis la 28-an de aprilo 2021  
sur la tombejo ĉe la str. Wojska Polskiego 95 en Milanówek.  
Kun la granda malĝojo, Ĉefa Estraro de PEA



# El fotogalerio de Andrzej Sochacki

*Andrzej Sochacki*

## 7-aj Esperantaj Tagoj de Staszów 27-30.05.1993

La aranĝon organizis E-Klubo de Staszów kunlabore kun la loka Kulturdomo kaj la Urba Estraro. Partoprenis en ĝi 96 personoj el Pollando kun gastoj el Germanio kaj Ĉinio. Partprenantoj loĝis en la ripozdomo Chańcza.

En la solena malfermo partoprenis membroj de la Urba Estraro de Staszów kaj reprezentantoj de la Vojevodio Kulturdomo en Tarnobrzeg.

Dum la aranĝo Ryszard Rauczyński kun Grażyna Porada gvidis E-kurson por komencantoj kaj Lidia Ligęza gvidis konversacian rondon por progresantoj. Inter multaj prelegoj indas menciigi prelegon de A. Dietrich el Germanio "La edukantoj de la homaro" kaj prelegoj de Stanisław Świstak: "L.L.Zamenhof - al kiu nacio li apartenas?", kaj „Tra landoj kaj maroj kaj al la steloj”. Marian Kostecki prezentis interesajn lumbildojn pri Krakovo.

La vesperan, artan programon plenumis la kabaredo AMUZO kaj la Koruso KAMEA el Krakovo.

Laŭkutime, en la programo de ETdS okazis ankaŭ ekskursoj. La unua al la ĉevalbredejo en Kurozwęki kaj la dua al Świątokrzyskie-montaro.

Organizis, fotis kaj raportis: Andrzej Sochacki.



Andrzej Sochacki kaj Lidia Ligęza dum malfermo de ETdS 1993

Dum malfermo  
en unua vico  
sidas anoj de  
Urba kaj  
Vojevodio  
estraro.




Koncertas  
Jadwiga  
Dzięgielewska  
kun akompano  
de Grażyna  
Nazarko



Koruso KAMEA  
el Krakovo. La  
koruson gvidis  
Zbigniew  
Warmuz (unua  
de maldekstre)





↩  
E-kurson por komencantoj  
gvidas Grazyna Porada kun  
Ryszard Rauczyński



↩  
Vespero ĉe bivakfajro

↓  
Komuna foto antaŭ gastejo  
“Siesto” post tagmanĝo



Adam Wilkus

## Resumoj de publikigitaj ĝis nun krukenigmoj

La krukenigmo pri birdoj: PE 3/2020

1. PAVO, 2. ARDEO, 3. CIKONIO, 4. KOLOMBO, 5. HIRUNDO, 6. STRIGO,
7. FLAMENGO, 8. KUKOLO, 9. PELIKANO, 10. PINGVENO, 11. CIGNO,
12. KOLIBO, 13. PEGO, 14. AGLO, 15. FALKO, 16. GAROLO, 17. IBISO,
18. ALBATROSO, 19. KORMORANO

La krukenigmo pri bestoj: PE 4/2020


1. ELEFANTO, 2. LEONO, 3. URSO, 4. VESPERTO, 5. KROKODILO, 6. KAMELO
7. BALENO, 8. KANGURUO, 9. SERPENTO, 10. OKPIEDULO,
11. MELHUNDO, 12. CERVO, 13. MUFLONO

La krukenigmo pri arboj: PE 5/2020

1. FRAKSENO, 2. LARIKO, 3. ACERO, 4. ABIO, 5. TILIO, 6. TAKSUSO,
7. SALIKO, 8. PICEO, 9. KAŜTANARBO, 10. FAGO, 11. KVERKO, 12. BETULO

La krukenigmo pri insektoj: PE 6/2020

1. VESPO, 2. KOKCINELO, 3. ARANEO, 4. AFIDO, 5. ABELO, 6. LOKUSTO,
7. MANTO, 8. LIBELO, 9. PAPILIO, 10. MOSKITO



Robert Kamiński

## Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando - 2

Ekde kreado de la internacia lingvo Esperanto, pasis 133 jaroj. Jam dum la vivo de ĝia kreinto, esperantistoj en la tuta mondo honorigis lin, nomigante stratojn per la nomo de Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. Antaŭ kaj post la morto de la Majstro aperas en la tuta mondo tiaj monumentoj, placoj, parkoj, memortabuloj, ŝipoj, kaj eĉ planetoidoj. Kreskanta Esperanto-movado sammaniere honorigas ankaŭ aliajn aktivajn membrojn.

Ankaŭ en Pollando - patrujo de Esperanto, ekde la jaro 1919, aperas diversaj objektoj kun nomoj kunligitaj kun L. Zamenhof kaj E-movado. La impona nombro de ili konstante kreskas. Sube prezentita listo montras ĉiujn, ĝis nun registritaj tiuspecaj objektojn en Pollando. Mi volas prezenti polan ZEO-liston en la sekvaj ses numeroj de „Pola Esperantisto“.

Mian registradon de ZEO en Pollando mi komencis en la jaro 1996. Registradon de ZEO-j en la mondo komencis *Hugo Röllinger*, per la libro „Monumente pri Esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj, en 54 landoj”, kiun eldonis UEA en 1997. Ekde tiu jaro mi serĉas kaj registras ĉiujn objektojn, dediĉitaj al nia majstro kaj Esperanto movado.

Ni kune kompletigu kaj korektu la liston. Se vi trovos novan, ne registritan ZEO-n, aŭ se vi havas pli detalajn informojn pri ĝi, bonvolu kontaktiĝi kun mi. Jen mia retadreso: rk-lodzo@wp.pl. Vi ankaŭ povas viziti la fejsbukan retpaĝon pri ZEO: <https://www.facebook.com/groups/128827667179539>.

Ĉu vi memoras kaj zorgas pri ZEO en via ĉirakŭaĵo? Kontrolu, ĉu ĝi ekzistas. Purigu tabulon, metu florojn ĉe la monumento (eĉ artefaritajn). Montru, ke ekzistas homoj, por kiuj ĉiu ZEO estas grava.

N-ro	Situo	Objekto	Ekzistas de la jaro
40.	Dzierżoniów	Zamenhof-strato	?
41.	Frombork, apud katedralo, ĉe defendmuro	Esperantlingva tabulo pri 500-a naskiĝdatreveno de M. Kopernik	1973
42.	Gdańsk, ĉe la str. Zamenhofa 22	Zamenhof-tabulo	1947
43.	Gdańsk, kv. „Wrzeszcz”	Zamenhof-strato	31.07.1927/ 1947
44.	Gdynia, kv. „Leszczynki”	Zamenhof-strato	1965

45.	Gdynia, kvartalo „Kamienna Góra”	Esperanto-kverko (ruĝa kverko)	02.08.2009
46.	Gliwice, kv. „Obrońców Pokoju”	Esperantistoj-strato	1987
47.	Gliwice, kv. „Obrońców Pokoju”	Zamenhof-strato	1987
48.	Gliwice, kv. „Obrońców Pokoju”	Antoni Grabowski-strato	29.06.2000
49.	Gliwice, kv. „Obrońców Pokoju”	Odo Bujwid-strato	29.06.2000
50.	Gliwice, tombejo Centralny ĉe la str. Kozielska 120	Esperantlingva surskribo sur tombo de Tadeusz Faliński	1974 (?)
51.	Gliwice, tombejo Centralny ĉe la str. Kozielska 120	Esperantlingva surskribo sur tombo de Tadeusz Matkowski	02.04.1994
52.	Gliwice, tombejo “Lipowy” str. Lipowa s. F2, rz. 18, g. 12	Esperantlingva -surskribo sur tombo de Jerzy Lewanderski „Ni neniam forgesos vin”	24.06.1982
53.	Gorzów Wielkopolski kv. Osiedle Dolinki	Zamenhof-strato	?
54.	Góra Śląska (apud Leszno)	Zamenhof-strato	1960
55.	Grabarka	Esperanto-kruco (ligna kruco kun esperantlingva surskribo)	29.05.2010
56.	Grudziądz, kv. „Strzemięcin”	Zamenhof-strato	?
57.	Jelenia Góra	Antoni Grabowski-strato	1945
58.	Jelenia Góra	Zamenhof-monumento	03.10.1948, 1969
59.	Jelenia Góra	Zamenhof-strato	1973
60.	Katowice, kv. „Szopienice”	Zamenhof-strato	?
61.	Katowice 10-a liceo je la nomo I.J. Paderewski. str. Miarki 6	Esperanto-murpentraĵo (teretaĝo apud enirejo)	2017
62.	Kemblowo / ĉe Wejherowo	Zamenhof-strato	1933/88 (?)
63.	Kępno	Zamenhof-strato	?
64.	Kielce, kv. „Szydłówek”	Zamenhof-strato	1966
65.	Kikorze (apud Goleniów)	Esperantlingva-tabulo pri la 15-a meridiano	18.11.1973
66.	Kłodzko	Parko “Esperanto”	1961
67.	Kłodzko	Tabulo sur ŝtono kun nomo de parko “Esperanto”	1987
68.	Koszalin	Zamenhof-strato	1976
69.	Koszalin, (sur skvaro en centra parto de la urbo)	Esperanto-monumento	4.10.1969
70.	Koszalin	Esperanto-arbo (apude ŝtono kun ĉizita surskribo „Kverko de paco”)	22.05.1978

71.	Kraków	Zamenhof-strato	02.8.1931/ 1956
72.	Kraków, tombejo ĉe la str. Rakowicka 26,	Esperantlingva surskribo sur tombo de Jadwiga Kordylewska. Parto 25 vidalvide de limo inter parto O kaj P.	01.02.1977
73.	Kraków, ĉe la str. Zamenhofs	Esperantlingva tabulo pri UK en 1912	1931,1956
74.	Krościenko (nad Dunajcem)	Esperanto-strato	1996
75.	Kutno	Zamenhof-strato	1965, ?
76.	Łądek Zdrój	Zamenhof-strato	?
77.	Leszno Wielkopolskie	Zamenhof-kvartalo	?
78.	Licheń apud Konin	Esperantlingva-tabulo RL 5/9 (oferdona tabuleto)	21.09.2003
79.	Lubań Śląski	Esperantistoj-strato	?
80.	Lublin, kv. „Abramowice”	Zamenhof-strato	?
81.	Lublin	Esperantlingva-epitaĵo sur tombo de	13.05.1918



Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Łódź.

1. Bonza tabulo al Ludoviko Zamenhof pendigita en 1974. (jam tria E-memortabulo en tiu ĉi loko).
2. Surstrata pavimero kun metala tabuleto: „Łodzka Filio de Pola Esperanto-Asocio”. Dekstre troviĝas pavimero de esperantista familio Pruszyński, kiu fondis ambaŭ pavimeroj.



### Erarĝustigo por PE 1-2021

estas	devas esti
paĝo 2 - "...artikolon de tiu fama historiisto de Esperanto movado."	"...artikolon de tiu fama historiisto de Esperanto-movado."
paĝo 2 - "...la unuan fojon..."	"...la trian fojon (en 2004 kaj 2012)"
paĝo 8 - mankas inform:	La artikolo unuan fojon aperis en "Militrakonto" ĉe: <a href="https://mondmilito.hypotheses.org/">https://mondmilito.hypotheses.org/</a>





ZEO-j en: Bydgoszcz - Ponto Esperanto, Duszniki Zdrój - monumento, Gdańsk - strato, Gdansk - strato, Elbląg - skvaro, Jelenia Góra - strato



  
**Higiene-Beutel**

**für Damenbinden**  
 Bitte nicht ins WC, sondern in den Toiletten-Eimer werfen.  
**Bag for Sanitary Pads**  
 Please do not throw in WC., but in the pail, will be removed by chamber maid!  
**Sac pour Serviettes Hygiéniques**  
 Prière de ne pas jeter dans les W.C., la femme de ménage les enlèvera!  
**Sacchetto**  
 Igieno per fascie igieniche  
 Si prega di non gettarle nel gabinetto, bensì di metterle nel cestino toilette. Sarà allontanato dalla cameriera.  
**Lütfen Adet bezlerinizi WC atamayiniz, bu torbaya koyup çöp tenekesine atınız.**  
**Higiena saketo**  
 por menstrusorbiloj.  
 Bonvolu ne meti ĝin en la pelvon, sed en la tiucelan ujon.  
 La ĉambristino forigos ĝin.




Higiena saketo kun esperantlingva surskribo trovita en restoracio en Regensburg/Germanio

# NIA FOTOGALERIO



Stelo el kandeloj antaŭ  
Zamenhof-monumento en Bjalistoko  
okaze de lia mortodatreveno  
la 14-a de aprilo

Sennacieca  
Asocio  
Tutmonda  
1921-2021



Psyhraimia • Niente panico  
Dubon't Pubanubic • Natarse  
Ne ess pánikba! • Bez panike  
Tea paanikasse sattuv • Yek ma  
Ta det lugnt • Ná biodh scaoll ort  
Haraab nakun • Ne panicari  
Slappadu af • Ne panikuy

Älä hätäile • Don't panic  
Shinpai suruna • Uoki maka'u kuhewa  
Noli pavere • Ontday anicpay

## NE PANIKU

Ne paniquez • Tippanikjax  
Tidak kelabakan • Bu yao huang  
Geen paniek • Ny gow aggle  
yIlImQo' • Nepropadejte panice  
Ghabari beda • Non affolla vos  
Nie Panikowac • Ghabarao mat  
No tinguis por • La tahreeb  
Moenie paniek nie • Ta det rolig  
Niet panikeren • Keine Panik  
Não entre em panico  
No asustase • Tag det roligt



Partoprenantoj de retaj E-renkontiĝoj  
en Sopot

Lernantoj de la Lernejo de Kulturo kaj  
Pola Lingvo „Pollando” en Bjalistoko

Ĉu vi aŭskultas elsendojn de Varsovia Vento - [www.podkasto.net?](http://www.podkasto.net?)